


Monda Pirismo



*Bela projekto de esperanto-statuo por
Gotenburgo sendita de s-ino Frida
Christaller (Stuttgart).*

I

MARTO-APRILIO

1955

NORDA PRISMO

*Kultura, socia, literatura
revuo, dumonata*

Redaktoro:

d-ro Ferenc Szilágyi.

Ansvarig utgivare:

Yngve Nilsson.

Adresoj:

La redaktoro: Mariedalsgatan 9,
BORÅS, (Tel. 244 22).

Administrado:

Barnhusgatan 8, Stokholmo.

Abonprezo:

6: sv. kr. (15 int. rpk. 1:20 us dol.
18 steloj.) Unuopa numero 1:25 sv.
kr. (3 int. rpk.) Abonu ĉe la admini-
strejo per poŝtĉeka konto 15 54 80
aŭ ĉe la landaj esperanto-eldonejoj-
libroservoj.

Anoncoj:

1/1 paĝo 40:— sv. kr., 1/2 p. 25:—,
1/4 p. 15:—, 1/8 p. 10:—, 1/6 p.
7:—, Korespondaj anoncoj 2:— sv.
kr. (5 int. rpk.)

La redaktejo ne resendas ne akcepti-
tajn manuskriptojn.

SALUTON AL LA LEGANTO!

Pri niaj celoj kaj nia maniero la leganto trovas indikojn en la sekva kaj ceteraj artikoloj. Resume ni estas: norda, progresiva, observa, kritika, kultura, socia, literatura organo.

Pri la amplekso de la gazeto. Ni aperigos ĝin kiel dumonatan periodaĵon, t. e. sesfoje ĉiujare. La amplekso de la numeroj estos 48 paĝoj. Estas evidente, ke en 1955 ni povos aperi nur kvinfoje, sed por doni la saman paĝkvanton en la manojn de la legantoj, ni aperigos tri numerojn sur 64 kaj du sur 48 paĝoj.

Kaj fine — sed ne sensignife: Ni ne forgesos, sed ankaŭ vi ne forgesu, kara legantaro, ke nia kulturo *bezonas ne nur publikecon, sed ankaŭ publikon.*

La redaktoro

Ni sentas, kvazaŭ ni starus meze de la legantaro: oni ankoraŭ ne konas nin, ni devas prezenti nin, montri, kiaj ni estas, kian impreson ni volas vekti inter niaj amikoj.

Tio, kio garantias la amikan akcepton, estas nia lingvo, sed pri ĝia valoro ni ne multe parolos en tiu ĉi artikolo kaj same ne cetere en la gazeto. La valoro de la lingvo estas fakto, sed tio, kion ni devas pruvi tagon post tago al la mondo, kaj ankau al ni mem, ke ni havas kulturon, ke nia movado estas kulturmovado, kies eblecoj estas eluzindaj kaj eĉ eluzendaj de la homaro.

Nia vidpunkto estas norda, skandinavia: granda parto de nia spaco rilatos la vivon, la kulturon, la problemaron de Skandinavio; sed ni ne limigos nian horizonton nur al la nordo, tra norda prismo ni esploros aliajn regionojn, Nia originala literaturo ne evitos nian atenton. Entute ni intencas prezenti specialan organon kun specialaj trajtoj, kiuj motivoj la ekziston de la revuo.

*

Ni volas esti poresperanta revuo, ne tiom per la rimedoj de priesperantismo ol per peresperantisma agado: ni parolos pri kulturo, socio, literaturo Esperantlingve. La movado aperos sur tiuj ĉi paĝoj nur grandtrajte, pri ĝiaj detaloj efemeraj ni ne diros multe. Sed ni volas pruvi al ĉiu intersemulo, ĉu esperantisto, ĉu ne-esperantisto, ke estas multe da latentaj, neekspluatitaj trezoroj en la kultura mondo, per kies aperigo nia lingvo signifas gravegan instrumenton.

La grava decido de Unesko en Monte-

video donas al ni vastan faskon de solvotaj taskoj. Tiel ni perceptu la distingon de la Rezolucio, kiu konas la rezulton kaj la eblojn de la neŭtrala internacia lingvo. Sed ankau la protokoloj de tiu rezolucio montras, ke ni devas batali per la armiloj de la serioza konvinko kontraŭ la plej malfacile trapenetrebla kiraso: la homa stulteco.

Ne kredu, ke la stulteco estas privilegio de la analfabetoj

Ne, male. La analfabetoj estas nur malfeliĉuloj, sed inter favoraj cirkonstancoj ili lernas skribi, legi, kalkuli kaj kompreni. Sed obstinaj nekredemuloj estas inter la lernintoj, en kies aro troviĝas parto, kiu emas transformi la sciencon je superstiĉo, kiu ĵaluze fermas sin en la akiritan scion. Iom pli tiu ĉi parto ne volas scii. Niaj plej danĝeraj malamikoj estas tiuj, kiuj atingis profesoran katedron kun tia, ĵaluze konservata kaj konservativa scio, kiuj samtempe ofte emas deklari opiniojn pri aferoj, kiujn ili nek konas nek emas ekkoni. La prestiĝo de tiaj obstinuloj povas mistifiki la homojn; pri tio troviĝas abundaj ekzemploj ĉiufoje, kiam la uzo kaj rolo de Esperanto diskutigis ie, antaŭ Unesko, aŭ alia instanco.

Se ni kredus al tiuj eldiroj, tiam ni eĉ ne kuraĝus paroli nian lingvon, „kiu eĉ ne taŭgas por la esprimo de la plej ordinaraĵoj, kiu ne povas esti komprenebla al diversnaciuloj, ĉar oni ne povas ĝin paroli egale; pri scienco kaj literaturo oni ne povas paroli en kontakto de nia lingvo, ĉar ĝi estas artefarita, ĝia kreo estas peko kontraŭ naturo, ĝi ne povas

PRISMO

esti utila "ktp. ktp. (Citaĵo el la parolado de prof. Blinkeberg.)

Kompreneble ni ne verkas por tiu ĉi ne konvinkebla fragmento de la „aŭtoritatoj”: sed parte al nia anaro kaj al tiuj, kiujn povus influ la falsa prestiĝo, se oni ne povus refuti la stultajn asertojn per la kontaktoj, kongresoj, literaturaj produktoj, kulturaj revuoj, entute per la tuta, kultura vivo de nia movado, kies utila faktoro deziras esti nia "Prismo".

Kiu estas somnambulo?

Longe ni ne intencas restadi ĉe la eldiroj, kiuj vekas nian reagon. Sed ni volas nur mencii, ke la faka organo de la svedaj tipografoj (*Svensk Typograf Tidning* n-ro 2, 1955). citas kelkajn eldirojn kontraŭ Esperanto. Unu el ili devenas de la redaktoro de germana gazeto "Muttersprache". Ni ne volas citi en sia tuto la argumentadon de la tre respektinda redaktoro. Sufiĉas la lasta parto de tiu kun la simpla konstato, ke la komenco de la citaĵo reprezentas la saman nivelon:

"Artefarita lingvo tute malhavas ĉion, per kio la vorto, kiel io vivanta neeldirita transiras de homo al homo, ĉion de spirita kaj anima valoro, agforto, ŝerco kaj humoro, moviĝemo de la menso."

La respektinda redaktoro komencas sian kritikon per la vorto: somnambuloj, ni... Sed, ĉu vere ni estas somnambuloj?

Barono von *Lichtenberg*, profesoro en arhistorio kaj arkeologio donacis al la homaron la jenan prudentaĵon pri Esperanto.

"La arbitre konstruitaj lingvoj, kiel

Volapuk kaj Esperanto, kreskis el la sama radiko. Tiu ĉi radiko estas la malestimo de la naciaj diferencaĵoj kaj la kulturdomaĝa strebo al la unudirektigo. Tiaokaze oni ne konsideras, ke oni celas ion neeblan kaj la naturo mem estas la plej granda kontraŭstaranto de la plano. Ĉiu raso havas de la naturo ne forigeblan indikitan manieron por pensi, sian propran manieron por percepti, kiuj jam de la bazo estas diferencaj de tiuj de aliaj rasoj..."

Raslingvo... diras la meritoplena profesoro de la arkeologio, kiu uzas sian propran raslingvon kaj sian akran razklingon, por fortranĉi la radikon de nia *malutila* lingvo, kaj fine li venas al la konkludo, ke estas vane kaj absurde konstrui lingvon ĉu parolan, ĉu skriban. La simplan fakton, ke ni ekzistas kaj funkcias, laŭ la rezultoj ne je la malutilo de la homa kulturo, oni simple forgesas, kiam oni sidas tro longe en sia stalaktitgroto, kie eĉ la barbo de la respektinda profesoro iĝas stalaktita; laŭ tiuj sinjoroj oni estas kaj restas ĉe la strangaj teorioj de la pasintaj jardekoj, kiuj kostis tiom da sango al la homaro.

Profesoro *Blinkeberg* en Montevideo diris i. a. ke Esperanto havas malriĉan vortaron, primitivan sintakson, ke ĝi ne povas servi por la literaturo, entute ne por kulturaj celoj.

La profesora barbo kaŝas ofte tute ordinaran vizaĝon. Kompreneble estas ankaŭ alispecaj sciencistoj; ni povas fieri pri la sobra kaj objektiva scio de profesoro Björn *Collinder* (Uppsala). El lia opinio ni citos iom pli poste (zorge disig-

inta lin de la veraĵ somnambuloj de la profesora kasto.).

De la stalaktitgroto ĝis la biblioteko de Adamo

Inter la herooj de la scienco neniam mankis la pseŭdoaŭtoritatoj. Subite ni rememoras la favoratajn diskutojn de la XVII-a kaj XVIII-a jarcentoj: *Kiu estis la unua verkisto?* Ne nur unu, sed aro da sciencistoj venis al la rezulto, ke *Adamo mem verkis la unuan libron.*

Mi citas nun parteton el la libro de *I. Ráth — Végh* ("A könyv komédiája", Budapest, 1937. "La Komedio de la libro".)

"Verkisto devas esti scienculo. Longa diskuto ekestis pri la erudicio scienca de Adamo, ĝis fine elformiĝis la opinio, ke *Adamo sciis ĉiom.* T. e., ke li estis la unua polihistoro. Kiel oni tiam diris: Grammaticus, Philosophus, Astrologus, Mathematicus, Theologus, Jurisconsultus. Pri la vasta diskuto ankaŭ *Bayle* memoras. Li mencias scienciston, kiu havis nur tiun modestan dubon, ke la praavo eble tamen ne estis kompetenta pri *politiko*. Oni silentigis lin, same kiel la partianojn de Salomono, konstatinte, ke la saĝo de Salomono ne venis eĉ en la proksimon al tiu de Adamo . . ."

"Ĉion ĉi grandprestiĝaj profesoroj konstatis, kiuj instruis en diversaj germanaj universitatoj pri la diversaj branĉoj de la scienco de Adamo."

Ni interrompas la citadon por enmeti almenaŭ du librotitolojn el la multaj:

J. Mader: De scriptis et bibliothecis antediluvianis (Helmstadt, 1702.) Esperantlingve la titolo signifas: Pri skribaĵoj antaŭ la diluvo. *G. Vockerodt* verkis longtitolan verkon pri la sama temo: *De bibliotheca Adami.* (Dresden 1703.) Nu,

ĉiukaze la menciitaj plus ankoraŭ multaj aliaj prestiĝuloj venis al tiu konkludo, ke (*ni citas el la libro Ráth — Végh*).

"Adamo sume verkis 12 librojn. Eĉ la pioniroj de la feminismo povas kontente konstati, ke ankaŭ *Evo* verkis du."

La verkoj de Adamo: 1 Aboco-libro 2. La libro de la revelacio 3. Eseo pri la ŝtono de la saĝo kaj orfarado (?!) 4. La libro de la Ordo 5. Libro pri la kreitaĵoj" ktp. ktp. ĝis la 12-a verko (La poeziaĵoj de Adamo).

Iom rilatas la lingvan temon la diskuto pri la lingvo de "Adamo, inventinto de ĉiuj sciencoj". La plej multaj aŭtoroj donis sian voĉon al la hebrea lingvo, kiel parollingvo en la Paradizo, sed ekzistis diversaj aliaj opinioj, el kiuj estas menciinda tiu de *A. Kempe*, kiu asertis, ke Dio parolis svede, Adamo respondis dane, kaj la serpento franclingve delogis Evon en la Edeno. *Peignot* franca sciencisto, kiu retrovis tiun ĉi strangan libron, vidas nur koncerne la parolon de la serpento iom da verŝajno, konante la galantan naturon de sia nacio," (Citaĵo el la libro de *Ráth — Végh*).

*

Ne estas malfacile trovi la paralelon inter la esploroj pri la biblioteko de la praavo kaj la "raslingvaĵoj". *Nia intenco absolute ne estas skui la kredon pri la utilo de la scienco*, sed aliflanke ankaŭ la menciitaj ekzemploj ilustras la fakton, ke neniam kaj nenie okazis nur utilaj laboroj sub la ŝildo de la scienco. Ni devas esti kritikaj ni devas selekti la spikon de la brano.

Artefarita lingvo . . .

El tio sekvas la devo, ke ni citu ankaŭ opinion, bazitan parte sur sana scio kaj scienco, parte sur klara kaj vera kono de

la problemo. Profesoro *Björn Collinder* donas tutan ĉapitron al la "artefarita lingvo" en sia valora "Enkonduko en la lingvosciencan" (Introduction i Språkvetenskapen, Stockholm 1941.), el kiu ĉapitro ni citas nur la jenajn frazojn:

"Koncerne la vorttrezoron lingvo el la tipo de Esperanto ne estas pli artefarita ol la provizo de encerbigitaj pruntvortoj, ekzistantaj en ĉiu literatura lingvo. La vortradikoj de Esperanto ne estas fabrikataj, sed pruntitaj, kaj la signifo de la vortoj ne estas arbitre fiksitaj, sed hereditaj kaj transprenitaj de la vivantaj naturlingvoj... Kaj fine: la demando, kio estas 'natura' en iu lingvo, tiel kiel ĝi prezentas tion al ni, estas prefere demando pri tio, kiaj estas niaj kutimoj. Al

germano efikas la nederlanda lingvo je la unua vido, kiel eltordita germana, al nederlandano la germana kiel eltordita nederlanda."

Kiel ajn nin tentas la interesa ĉapitro por plua citado, ni ne daŭrigas nun. Oni povas ja legi la opinion de prof. Collinder en la menciita sveda libro kaj en la esperantlingva: La problemo de lingvo internacia.

Sed ĉio, kion ni ĵus pripensis, menciis, citis, pridiskutis, regvidas nin al nia konkludo ĉe la unua parto de tiu ĉi artikolo, ke ni sentas grava la taskon de tiu ĉi nova revuo: rekte kaj nerekte informi, pligrandigi la publikon de la komuna, universala lingvo pri ĉio, kio apartenas al la nocio: *kulturo*.



Fabelinsulo. Pentraĵo de Aevar Thòrballsson (13 jara knabo), Hjalteyri, Islando.

ELEKTO-AFLIKTO*

GUSTAF FRÖDING (1860—1911). Unu el la plej grandaj poetoj de la sveda Parnaso. Lia produkto konsistas el spritaj satiroj, realeca, popolkantsimila liriko kaj profunda filozofa liriko. Lingvovirtuozo.

Maljunulo kaj vidvo li estas kaj kurba,
la servistojn li premas. Li knaras, avaras;
se mi iĝus la lia, mi estus ja turba.
Kaj fi, avarulo! Kaj fi — vi senharas...
Kaj infanojn li havas, ho ve!
Edziniĝi al li? Tute ne.

Sed se tamen mi pensas pri korto kaj
greno,
pri la porkoj dikventraj, plenmamaj
bovinoj,
kaj pensas pri ĉiuj penego, ĉagreno,
kiujn havas pro vestoj kaj ŝuoj virinoj —
mi cerbumas en mia mizer':
pripensinda, ĉi tiu afer'.

Al alia, tre vere, mi iam promesis
iĝi lia, tuj kiam li venos de l'maro.
Ho, rektodorsa li estis, ĉar riĉo ne pezis.
Kia junco floranta, kia bukla hararo...
Mi lin amus per tuta anim',
se mi havus lin en la proksim'.

Sed ne povas mi tamen ne iom pripensi
la kaldronojn brilantajn, el kupra metalo
— ĉu toleri viraĉon, pri li pacienci?
Tre kaduka li estas: vidvina vualo...
Jes, pri tiom rezigni ja estus domaĝ',
vera peko, ridinda malsaĝ'.

Sed pli grandas la peko, min trompe
fortiri
de amato fidanta, al kiu mi jesis,
kvazaŭ ŝtofon tre molan kaj karan
diŝŝiri.

Mia kapo turniĝas, haltante forgesis
mia kor' sian devon pro li,
kaj plorige nun estas al mi...

Hm, ĉi tiu kurbulo kun siaj teleroj.
Litkusenoj nubŝvelas, plenplenas la
ŝrankoj.

Ŝatas ludi la pens' per arĝentaj kuleroj,
per bovinoj kaj porkoj kaj mono en
bankoj.

Hm, mi kredas, ke jes... Ho, mi kredas,
ke jes,
eĉ se estus infanoj dek ses!

(Trad. el la sveda: Magda Carlsson)

*) El la "Sveda Poemaro"

SVEDLANDO POST JARCENTO

ERIK GAMBY sveda verkisto (1908). Poeto, tradukisto i.a. el la japana kaj turka liriko. Kiel ĵurnalisto li ofte aperas per t. n. "kulturartikoloj", el kiuj unu estas la suba. Lia debat-libro. "Träsket" (la marĉo) donas akran kritikon de la eldona sistemo.

Oni aŭdas kelkfoje malhelajn profetaĵojn pri la sorto de la mondo. Se la pliiĝo de la homoj daŭros same kiel ĝis nun, nia tero tre baldaŭ havos pli da homoj ol eblon por nutri ilin, oni diras, kaj oni faras kalkulojn, ĝis kiam la fero, oleo aŭ aliaj gravaj naturmaterioj sufiĉos. Sciencistoj kutimas respondi al tiuj, klarigante, ke la kalkuloj estas eraraj, ke la okazanta transformado de la produkto kaj konsumo ŝanĝos la situacion post cent jaroj, kaj la danĝero ne pendas super nia kapo. La homaro rajtas do trankvile ekriprozi.

Troviĝas ankaŭ homoj, kiuj konsolas sin per tio, ke Gracoplena Providenco prizorgas, ke la arboj ne kresku ĝis la ĉielo. Se la teron minacos trodenseco, okazos io, ili diras, kio solvos la problemon. Okazos mondmilito, malsatmorto aŭ ekestos naturkatastrofoj, tiel ke granda amaso da homoj pereos, kaj la homaro povos komenci denove de la komenco.

Tio lasta estas bela konsolo, ĉu ne? Kaj estas eĉ pli malbone: ĝi estas falsa kaj nekompetenta. Eĉ la plej dezertiganta milito ne havis entute tro gravan signifon por la popolnombraj rilatoj. Eĉ la lasta mondmilito kun siaj 9 milionoj da falintoj en la bataloj kaj ĉ. 12 milionoj mortigitaj civiluloj estas nur guto, se ni komparas tion al la homkresko. Ĝi eĉ

ne respondas al normala popolkreska statistiko!

Sed eĉ se troviĝas sufiĉe da nutro, la pligrandiĝanta popolnombro trenas post si multe da ĉagrenoj.

Kiel la homkresko okazos?

La nombro de la homaro kreskas per 25 milionoj ĉiujare, kaj la kresko okazas en akcela ritmo. Dum 8 jaroj plinombrigiĝas la tero per tuta kontinento, ĉar 200 milionoj estas adekvataj al la tuta loĝantaro de Afriko, aŭ Nordameriko aŭ Sovetio. La mondo nun havas loĝantaron de 2.400 milionoj, kaj post jarcento ni estos ĉe la nombro 7 miliardoj. Tia kresko ne povas esti sendolora. Tio postulas transformi la fontaron de la vivteno kaj transigi la laborfortojn.

La kresko de la popoloj, kiel ĉiu scias, estas diversa en diversaj landoj. Plej malgranda ĝi estas en Grandbritio, Belgio kaj Svedlando, kaj plej alta en la tipe terkulturaj landoj de Azio kaj Sudameriko. La kutima opinio estas ververe, ke la homnombra kresko estas plej granda en landoj kiel Ĉinio kaj Hindio, sed tio ne plu koincidas kun la faktoj. La hinda kresko promile ne estas pli granda ol tiu de Norvegio, kaj kvankam oni ne havas statistikajn ciferojn el la Ĉina Regno,

apenaŭ estas motivo kredi, ke tie la kresko estas pli rapida ol en la industriigita Japanio, kie la loĝantaro sesobliĝos dum unu jarcento. Samtempe troviĝas landoj en Mez-Ameriko, kie la loĝantaro iĝos 30-obla dum jarcento. Rilate Svedlandon: estos necesa pli ol tuta jarcento por la duobliĝo de la loĝantaro.

Mi elkalkulis, kiom da loĝantoj havos la plej gravaj landoj per kvadratkilometro post unu jarcento konsiderante la ĝisnunan evoluon, kiel bazon. Tio iĝis interesa tabelo:

Japanio	1350	Svisio	262
Nederlando .	1250	Francio	175
Pollando . . .	640	Hispanio . . .	137
Grandbritio .	472	Egipto	120
Belgio	454	Irlando	103
Italio	430	Sovetio	88
Ĉeĥoslovakio	392	Usono	64
Germanio ..	360	Finnlando ..	50
Portugalio ..	322	Norvegio ..	30
Hindio	300	Svedlando ..	30
Ĉinio	300	Kanado	6
Danlando ..	264		

Estas klare, ke la plej okulfrapa estas la malpleneco de la Skandinavia Duoninsulo en tiu ĉi evoluo. Norvegio havas nuntempe po dek loĝantoj kvadratkilometre kaj Svedlando 16. Pro la pli rapida plinombriĝo Norvegio atingos Svedion dum unu jarcento. En Finnlando oni povas kalkuli, ke la nuna nombro 12 kreskos je 50 kvadratkilometre.

Sendube neniu scias, ĉu la plinombriĝo okazos samvoje en la estonteco kiel ĝis nun. Sed ni scias jam nun statistikajn ciferojn koncerne pli ol po 300 kvadratkilometre (Nederlando kaj Saar-teritorio), sen ke tio grave reagus al la reprodukta rapideco. En Nederlando do duobliĝos la loĝantaro dum 46 jaroj, kvankam oni jam nun kalkulas 312 loĝantojn ĉiukvadratkilometre. Tio signi-

fas, ke oni ne povas tro fidi la proviĝon kiel nasko-baran faktoron. Male, oni devas konsideri, ke la plialtiĝanta higieno donos kompenson en la formo de malpli alta mortprocento kaj pli altaj aĝogrupoj en multaj eŭropaj landoj.

Oni ŝirmas sin

En la ĵusa pritraktado ni konsideris kiel fakton, ke la limoj, same kiel nun, ankaŭ en la daŭro, estos ĝenerale fermitaj, t. e. ke la plej multaj landoj ŝirmas sian vivnivelon kontraŭ eksterlanda konkurenco en la labormerkato. Tia politiko estas natura por mallonga tempospaco, sed por longa periodo ĝi baras la egaligon de la densdiversecoj: popolo el la dense loĝata teritorio kun malfacilaj sinprovizaj problemoj malhelpiĝas akiri laboron en landoj kun pli bonaj perlaboraj ebloj. Laŭ plialtiĝa cifero ĝis 100 loĝantoj ĉiukvadratkilometre en ekstremaj okazoj (ekz-e Nederlando kaj Japanio) la ekesto de malfacilaj problemoj multloke estas neeviteblaj. Se tia lando malhavas altgrade naturajn provizaĵojn, kiel ke eksporto, bazita sur industriigo de la tuta lando ne estas aranĝebla, forta tendenco de elmigremo klare validigas sin.

La problemo de la elmigrado jam de longe estas aktualega same en Eŭropo kiel en Azio. Nordameriko kaj la eŭropaj kolonioj en la ceteraj kontinentoj donis longtempe gravan rezervejon por la superfluo de la landoj. Nun jam Usono efektive fermis siajn limojn por elmigrantoj kaj la nombro de la enmigrantoj ne estas pli ol 25.000 jare. En la "koloraj" landoj regas malamo al fremduloj, kiu nuntempe maltaŭgigas tiujn kiel celo por elmigrado, kaj tial fluas la elmigra torrento al Kanado kaj Sudameriko. La plej bonaj regionoj estas tamen posedataj de rapide plinombriĝanta popolo, kaj tio, kio estas disponebla por la enmigrantoj,



Tia estas la aspekto de Eŭropo post la paso de jarcento kun preskaŭ senhoma Skandinavio kaj plua koncentriĝo en landoj, kiel Nederlando aŭ Polio.

estas izolita kaj ofte malsaniga dezerta regiono.

Forta premo

Inter tiaj cirkonstancoj la sekvo estas klara, en la estonteco devos ekevoluiĝi forta premo de la maldense loĝataj landoj de Skandinavio, unuavice al Svedlando, kiu havas la plej grandajn industriajn eblecojn. Se oni eĉ ne inkluzivas la grandajn spacojn de Norda Svedlando, eĉ tiam Svedlando estas nekutime maldense loĝata lando. La ĉefa industria teritorio

meze de la lando ampleksas pli malmulte ol trionon de la lando. En tiu parto la loĝdenso estas meze 37 loĝantoj. Laŭ la nuna kresko de la loĝantaro tio iĝos 65 loĝantoj por ĉiu kvadratkilometro post cent jaroj kontraŭ 264 en Danio kaj 360 en Germanio.

En la nordaj dutrionoj de Svedlando la maldenseco estas eĉ pli reganta. Eĉ se oni forigas el la kalkulado la duonon de Laponio, kiu estas neloĝebla, oni ricevas tamen nur la ciferon 7 per unu kvadratkilometro. Teorie oni povus havi tie 7,5 milionojn (kun 30 loĝantoj per km²),

LA PANTALONOJ

KAI SASS estas dana artisto kaj verkisto. Nask. 1898. Kiel artisto li distingas sin kiel eminenta pentristo de pejzaĝoj. Kiel verkisto li aperas ofte per noveloj, ofte satiraj.

La urbo situas alte. La freŝa aero tirigas al ĝi el la montaro kaj ludas super la tegmentoj. La ĉefurbo Arkina estas fama pro sia sano, ĝin ĉirkaŭas belaj boskoj kaj en la montoj torentas la riveroj. Ĝi ne estas granda urbo kaj ne granda lando. Sed la homo estis feliĉaj, iam ili estis feliĉaj. Ili havis pacon inter si kaj la najbarlandoj; ŝajnis esti idilio, perturbbla de nenio kaj neniam.

Estis tiel, antaŭ ol Plastiras venis al la potenco, antaŭ ol li ekhavis tiujn stultajn ideojn pri la forta mano, kiu devas gvidi ilin ĉiujn. Sed liaj paroladoj kaptis ilin, kaj igis ilin pensi pensojn, neniam antaŭe pensitajn.

”Rememoru” li kriis, ”ni estas Arkina-

kio signifus, ke la tuta lando ricevus loĝantaron kun la nombro de pli ol 21 milionoj. La popolvakuo, kiu devus pleniĝi dum la proksimaj cent jaroj, estas ne malpli ol 9 milionoj, eĉ kiam oni konsideras la naturan kreskon per ĉ. 5,5 milionoj.

Jen problemo, kiu certe postulas la atenton de la aŭtentikuloj en la koncertaj landoj de Skandinavio.

Laŭ la sveda originalo: S. O.

noj, fiero popolo, ni devas pravigi nin, lasu nin absolute kunligiĝi per la granda sento de la komuneco. Neniu kuraĝos veni al ni tro proksimen, sen ke ni montrus, kiuj ni estas kaj el kiu materio ni kreiĝis.”

”Li scias ion” diris Patras, la ŝuisto.” Je la ĉielo, li scias la manieron rapidigi la karuselon. Tiuj ĉi procesioj kun kanto kaj muziko, ne estas malsaĝaj —”.

Plastiras kreis armeon, kaj la armeo kreis armeestron. Aspektis impone, kiam li rajdis antaŭ la trupoj sur sia laktblanka ĉevalo. Lasu lin nur amuzi sin, oni diris, ne malutilas, ke la junuloj iom hardiĝas, ili ja povas bezoni tion, tiuj ĉi palnazuoj kiuj ŝvebadas ĉe la stratanguloj; tio estas pli bona ol flato kaj sato.

Ho, se ne estus nur okazinta tiu ĉi babilado kaj ĝeno pri Ursina.

Tra tiom da jaroj, ke tre maljunaj homoj eĉ povis rememori, arsinanoj kaj ursinanoj vivis en paco kaj toleremo unu kun la alia.

La kvereleto pri la rivero, kiu formis la limon inter la landoj, estis nenio por paroli pri ĝi. Tio estis nur ĉikaneto en plena amikeco. Sed nun Plastiras prenis la aferon el nacia arkina vidpunkto. La maljunuloj skuis la kapon, sed la junuloj ĵuris je Plastiras kaj ili torente kuris al

liaj kunvenoj kaj aŭskultis dum la okuloj brilis.

Kiel oni venis al tiu stato? Ne estis facile kompreni, kiel okazis, ke li nun sidis kun la potenco kun aparato de ministroj, kontorestroj, gardistoj kaj amaso da kontoroj, kie homoj, kiujn dum jaroj oni ne estus bezonintaj, nun sidis kaj plumblovis sin.

La pli aĝa kaj prudenta generacio ĉaĝreniĝis, sed neniu povis fari ion. Estis multaj, kiuj sekvis Plastiras eĉ en hajlo de aĵlo. La ursinanoj, stultuloj, kiuj ĉiam volus imitadi, ankaŭ ricevis ulon, kiu trogravigis sin kaj blekis pri popolfiero kaj solidaro.

Baldaŭ la agordo iĝis strange streĉita, Ne estis pli frue ol ankoraŭ pasintjare, kiam oni are procesiis al la rivero, staris kaj kantadis kaj incitis la ursinanojn ĉe la alia riverbordo. La forta forĝisto taŭgis por tio, lia voĉo rulis sin trans la akvon. Kiel ajn estis, ĉiam troviĝis iu, kiu respondis. Estis tia gajega printempa festo, kiu faciligis kaj ĝojigis ĉies animon. Vespere oni iris hejmen feliĉa mansalutinte la ursinanojn ĉe la alia flanko.

Nun anstataŭe estis ekzercoj. Plastiras rajdis antaŭ la armeo kun brue tintaj kanonoj kaj — dioj scias — kun kiaj novmodaj armiloj.

— — —

Dum la viroj de la urbo kuris de kunveno al kunveno kaj ŝanĝis inter si la vicon por iĝi parolanto kaj rikolti reciproke aplaŭdojn, iĝis ĝenerala kutimo, ke la virinoj kolektiĝis en pli-malpli grandaj rondoj. Kial ili ne farus tion? Ili ja devas kelkfoje havi okazon paroli kun iuj pri prudentaj aferoj. La viroj ne havis ion alian, nur la kapon plenan de stulto pri batalemo kaj virdeliro. Neri-markite la virinoj elektis unu el la amaso,

kiu facile povis direkti kaj gvidi la kunvenojn, kiuj pli kaj pli ekhavis la karakteron de kunsidoj. La urbestr-edzino, sinjorino Peneia estis la natura gvidanto, ne ĉar ŝi estis speciale reganta, sed ĉar ŝi havis sian propran manieron paroli kun etaj manmovoĵoj, kvazaŭ ŝi direktus ŝafaron. Ili parolis pri viroj, ne kiel viroj parolas pri virinoj, nenio sekse metis stampon al tiuj kunvenoj, estas eble, ke tio kaŝis sin ie sube; ili parolis pri la viroj kaj pritraktis ilin zorge de ĉiuj flankoj, diskutis pri iliaj kuriozaĵoj, kio iom post iom iĝis pli kaj pli evidenta. Pli frue la virinoj neniam okupis sin per tiaj pensoj. La viroj nur ekzistis, oni amuzis sin per ili kaj fartis tiel bone kun ili, kiel iliaj pensoj kaj sentoj permesis.

Peneia staris kaj ĉirkaŭrigardis en la rondo. Estis fakte iu, kiu honteme murmuris, ke viro estas tamen viro. "Kara eta sinjorino Kirassa" ŝi diris, "kompreneble mi ne volas kontesti la ĝustecon de tio, ke viro estas viro, iu tia ĝenerale aŭ tre ofte. Sed mi volas tamen aserti, ke ekzistas situacioj, kiam viro ne impresas tre vireca. "Sed, mia Dio, ĉarma Peneia, pri kio vi pensas? ili kriis, "diru al ni, kiu estas tiu situacio, tio sonas terure nervostreĉe".

Eta sinjorino Melassa, kiu ĉiam estis preta pri siaj bone enpakitaj pikiloj, diris flatagrabla: "Estas nekredible, Peneia, via edzo, kiu estas tiel bonforma kaj eleganta, povus impresi iam malvireca, tion mi ne povas kredi." "Ĉu ne, kara Melassa, vi devus do vere vidi lin en kalsono, en tia longa, vi scias, tiam li montras nenian spuron de vireco", ŝi diris seke.

"Mia Dio, en kalsono", ili ĉiuj kriis. "Ne, estas vere", estis iu, kiu diris tion kaj svingis la manon, kvazaŭ ŝi uzus iun el la ĵusnomitaj, kiel flagon, "neniu viro estas heroo en kalsono". Ili rigardis unu la alian kaj ridetis.

“Neniu estas heroo en kalsono. Ĉu vi povus imagi la grandan Plastiras, farante unu el siaj flavigaj paroladoj en kalsono?”

“Eble estas truoj sur ĝi” iu kriis, “aŭ verda ŝtopaĵo — iam mi konis viron . . .”

“Bone, bone”, aŭdiĝis la ordona voĉo de Peneia, “ni ne transiru nun al la memoraro.” Ili ridis kaj la virino kun la verdaĵo ruĝiĝis kaj klinis la kapon. Peneia staris tie kaj rigardis la gajan aron, kiu ridetanta kunŝovis la kapojn kaj interŝanĝis la spertojn. Kiam iom da trankvilo venis inter la ridemulojn, ŝi diris: “Tio signifas, ke forpreninte la pantalonon de la viroj, kion oni havas tiam?”

“Kalsonulon”, iu proponis.

“Mia edzo ne estas kalsonulo” diris la eta, blonda Amilla kolere. “Kial ‘ne?’” aŭdiĝis kolere de Janka. “Ĉu li estas pli bona ol niaj?”

“Tion mi ne scias” murmuris Amilla ĝenite, “sed li ne portas kalsonon.”

“Ni ne foriĝu de la temo” avertis Peneia, “ni samopinias, ke la pantalone estas la signo de la vira digneco, kaj ju pli eleganta estas la pantalone kaj ju pli riĉe ĝi estas provizita per galonoj, aŭ kiel ili nomiĝas, des pli ili pavas. Estas sufiĉe amuze pensi pri tio. Ĝi estas la rekonilo de la li o inter la homoj.”

“Kikeriki.”

“Trankvilon — ni jam longe parolis pri tio, kiel malfeliĉe ĉio evoluas en tiu ĉi lando, post kiam la viroj aperis kun tiuj ĉi striofrenezaĵoj. Tion vi scias bone!”

“Aŭdu, aŭdu, estas ĝustaj la vortoj de Peneia.”

“Jes, sed kion ni devus fari? Estas tute freneze aŭdi iliajn ‘hallo’, antaŭe neniam

estis io pri la ursinanoj, nun estas, kvazaŭ ili estus mortmalamiko, tio ja estas absurda.”

“Aŭskultu, kion mi diras. Mi ricevis ideon, sed pri unu afero ni devas interkonsenti, ke neniu el la viroj rajtas scii ion pri tio, kion ni preparas ĉi tie. Ĉu vi povas fari tion, ĉu vi povas silenti?”

“Jes” ili rapidis supervoĉi unu la alian. “Rakontu, pri kio vi pensas, tio estas freneze interese. Peneia, ni tenos fermita nian buŝon.”

“Sed” diris Peneia “se tio evoluos tiel, kiel mi time antaŭvidas, kaj la viroj estus sufiĉe frenezaj por voli militi kontraŭ la ursinanoj por tiu ridinda akvaĉo, ni virinoj devos obstakli ĝin.”

“Kiel, je la ĉielo’ ni devus konduki por tio, Peneia?”

“Tiel, ke ni forprenas la pantalonojn de la viroj!”

“Preni la pantalonojn de la viroj” ili kriis “vi estas vere die grandioza, Peneia.”

“Tion mi nomas renversita mondo” ridis Kamilla, pri kiu ĉiu sciis, ke ŝi havas amantojn, kiom ŝafoj sur la montebeno.

“Silentu! Lasu ŝin paroli, ĉu vi ne povas esti silentaj, kiam iu fine diris ion prudentan.”

“Se ili preparas sin por milito, ni devas kaŝi ĉiujn troveblajn pantalonojn. Eĉ unu ne rajtas resti!”

“Sed Peneia, la fraŭloj! Troviĝas tiom da fraŭloj! Troviĝas tiom da fraŭloj!”

“Nun mi venas al tiu temo. Mi scias, ke la tasko ne estas tre malfacila por la edzinoj, ĉiu scias ĉion pri la pantalonoj de sia edzo. Konsiderante la fraŭlojn multaj el vi devas fari personajn oferojn, ĉu vi ne estas pretaj por servi al tiel granda afero?”

”Jes” kriis pluraj kun flamantaj vizaĝoj, ”nenia ofero estas tro granda!”

”Jes, ja, Peneia”, iu diris ”kiel estos pri la ursinanoj, ili ja estas same frenezaj kiel niaj viroj, estus malagrabla, se ili atakus nin kaj niaj viroj ne povus defendi sin, ĉar ili ne havus pantalonon surpraneblan.”

”Vi pravas” diris mediteme Peneia” tio signifas, ke ni devas kunagi kun la ursinaj virinoj, cetere ne estus eble. Estas nun tempo komenci la laboron, tuj ni devas elekti kelkajn, kiuj veturos al ili kaj persvados ilin al nia plano. Ni kreas komitaton, kiu laboros pri la afero ĉi tie. Oni devas trovis kaŝejojn, skribi listojn pri ili; kiom da pantalonoj troviĝas, kiel eble plej multajn pantalonojn oni devas kaŝi en frua tempo, tion certe multaj virinoj povas fari. Sed nun aŭskultu ĉiuj, ĉu vi ĉiuj volas ĵuri, ke vi laboros por la afero kaj silentos. Diru post mi kun tri fingroj de la maldekstra mano al la ĉielo: ”Ni ĵuras, ke ni kaŝos la pantalonojn de la viroj, tiel ke ili staros senpantalonaĵe ĉe la tago de la batalo.”

”Ni ĵuras, Peneia” ili kriis entuziasme.

”Nia signalvorto estos P. F.”

”Kio estas tio?”

”Pantalonojn for!”

”P. F.” ili kriis, dum ili svingis la etenditajn fingrojn kaj la streĉitajn ĵurfingrojn kiel admonajn signojn.

— — —

Peneia estis la animo en la amaso de kunsidoj kaj elektoj, kiujn oni aranĝis en la sekva tempo. Ŝi fondis komitatojn, kiuj ricevis konfidencajn taskojn. Tie troviĝis registrantoj pri ĉiuj, en Arkina troveblaj pantalonoj de diversaj specoj. Ĉiutage entorentis listoj pri pantalonoj

de edzoj, patroj, fratoj, kuzoj, amikoj kaj ĉiuj eblaj vir-individuoj. Oni devis akiri kaŝejojn por ĉiuj pantalonoj kaj transporteblecojn por tien porti ilin. Aŭtoj, pakveturiloj kaj bicikloj estis disponigitaj. El Ursina alvenis rakontoj pri similaj aranĝoj. La virinoj akceptis la proponon kun entuziasmo. Ankoraŭ ili povis interkomunikiĝi, sed estis pli kaj pli malfacile tagon post tago. La tono inter la du landoj iĝis pli kaj akra. Plastiras faris unu post la alia siajn flamigajn paroladojn. ”La rivero”, li kriis, ”estas nia, ĝi estas la konturo, kiu ĉirkaŭas nian kulturpopolon. Tiu, kiu dubas pri nia justo, malpravas, kun armilo en la mano ni kapablos pruvi tion kaj defendi ĝin.”

Estis senspira rubando de paradoj, ekzercoj kaj amaskunvenoj. La junularo estis entuziasma, finfine oni povis montri, kion oni povas. La maljunuloj estis ĉagrenoplenaj. Ili kuntiris sin sur la stratoj. ”Estos katastrofo” ili diris. Sed je Dio, ili ja estis maljunaj, kiuj ne povis partopreni en la milito, kiel ili povus esti entuziasmaj.

En Ursina oni faris kaj diris precize la samon.

Tiel okupataj la viroj iĝis en Arkina kaj Ursina, ke ili absolute ne rimarkis, kion la virinoj entreprenas. Kiam nur la manĝo en ĝusta tempo atingis la tablon, ĉio estis en ordo. Nur kelkaj el ili miris pro la oftaj kunvenoj de la virinoj, sed kiam ili rimarkigis tion al la aliaj, la respondo estis: ”Tiaj estas la virinoj, ne zorgu pri ili, ili ŝatas babili kaj ariĝi.

— — —

Ne plu estis dubo pri tio, ke milito proksimiĝas. La not-interŝanĝo inter Arkina kaj Ursina ekhavis malagrablan karakteron. Tiuj, kiuj, esperis pri paca solvo, vidis siajn esperojn forvaporigantaj.

Plastiras ne lasis sin haltigi, kaj en Ursina la afero progresis sammaniere. Peneia, kiu gvidis kunvenon post kunveno por elektita rondo, estis kontentige informata de la eleganta Pia, kiu havis konatojn inter oficiroj en la generalstabo kaj tial ŝi sciis pri ĉio, kio sekvis. Peneia komprenis, ke la tempo por la ago alvenis kaj kunvokis ilin por lasta kunveno. Kiam ili kolektiĝis, ŝi diris: "Karaj amikinoj, mi ricevis informon, ke la tempo venis, kiam ni devas agi. Ĉu ni ĉiuj estas solidaraj?"

"Peneia, ni estas solidaraj. P. F." ili kriis en en firmritma ĥoro.

"Estas bone. Ĉiuj instrukcioj faritaj, deponejoj aranĝitaj, transportiloj disponeblaj. Mi havas ĉi tie" ŝi diris kaj skuis paperaron, "kompletan liston pri ĉiuj virpantalonoj, troveblaj en la lando, kaj tio estas terure granda nombro. Mi devas diri, ke tio superas miajn plej kuraĝajn konjektojn. El Ursina la sciigoj estas bonaj, ili laboras kiel ni laŭ komuna P. F.-plano."

"Vivu la virinoj de Ursina" ili kriis entuziasme.

"Ne tiel laŭte" averitis Peneia, "eĉ se la milito ankoraŭ ne estas deklarita, ni devas ĉiuokaze ekagi." Ŝi altigis la voĉon: "Ĉiuj pantalonoj, kiujn oni povas malhavi sen veko de suspekto, devas esti forigitaj al la indikitaj lokoj. Se iu el la viroj demandus pri forgesita pantalono, vi devas diri, ke vi sendis ĝin al la tajloro, aŭ elpensu ion alian."

"Tion ni certe povas fari, Peneia, fidu nin!"

"Estas bone, ankaŭ la virinoj de Ursina ricevis la decidon, ankaŭ ili komencas nun. Kiam la minuto por la atendebla milito de la viroj, estos deklarita, vi devos tuj ekagi, eĉ unu pantalono ne rajtas resti, kiam la viroj bezonos ilin. Estos Bartolomeo-nokto por la panta-

lonoj. Bruligu ilin, detruu ilin. Prenu viajn tondilojn, la solan armilon, per kiu oni provizis la virinojn, kaj tondu ilin je etaj pecoj, ke neniam ili estu refar-eblaj. Neniu rajtas perfidi nin, rememortion, sen pantalonoj ne estas milito.

"Aŭdu, aŭdu, sen pantalonoj ne estas milito."

Kiam iĝis iom pli trankvile, Peneia daŭrigis:

"Estis nur unu problemo, kiu kaŭzis malfacilaĵojn. Mi pensas pri la arma provizo, sed mi faris interkonsenton, laŭ kiu ĉie oni ekbruligos ilin. Mi elektis konfidindajn virinojn por tiu laboro. Ne rigardu min tiel ektive, la viroj nomus tion sabotado, sed ili nek volos nek povos puni nin, ili povas malhavi dum iom da tempo la pantalonon, sed ne la virinojn. Ni ne bezonas havi pli da kunvenoj. Faru vian devon kaj lasu al la senpantalonuloj la konsekvencojn de iliaj agoj. Post la lastaj vortoj ili manpremis reciproke kaj ĉiu reiris al sia hejmo.

Tiu nokto, kiam okazis decido pri la komenco de la bataloj je la aŭroro de la proksima tago, iĝis urĝoplena nokto por la virinoj en ambaŭ landoj, Arkina kaj Ursina. Silente ili prenis la pantalonojn desur la seĝoj ĉe la flankoj de la litoj de viroj, kaj malaperigis ilin senspure en centraj hejtejoj, kaĥelfornoj, aŭ transformis ilin je etaj ŝtofbuloj. Kelkaj el la viroj, kiuj ne volis enlitiĝi dum tiu ĉi grava nokto, ricevis admonon de siaj edzinoj enlitiĝi kaj permesi al si ripozon antaŭ la granda tago de la batalo. Kelkaj viroj volis dormi kun la vestoj sur si, sed amplenaj virinoj parolis al ili pri tio, kiel ne-saniga tio estus aŭ persvadis ilin laŭ alia maniero. Restis nur eta aro de gardistoj, ili povis resti, ili ja estis tiel malmultaj, ke ne estis sufiĉe por agi kiel armeo.

La mateno griziĝis dum la sortdecida

tago, la griza koloro ŝtele glitis super la tegmentojn. La grandaj preĝejsonoriloj eksonoris por kunvoki la virojn al la batalo.

La viroj saltis el la lito kaj volis preni sian pantalonon. Sed ĝi ne troviĝis. La matensilenta domo pleniĝis de blasfemoj kaj ekscititaj vortoj. Multaj el ili provis vesti sin sen pantalonon, sed ili rezignis senespere. De la plej eta loĝejo ĝis la plej grandaj domoj aŭdiĝis multvoĉa krio por la pantalonoj. La virinoj klinis sin silente sub la furiozaj blasfemoj de la viroj, sed ili tenis sin bravaj. Eble kelkaj el ili ploris, sed multaj ridetis sincere.

En la registara konstruaĵo Plastiras furiozis, li kuris ĉirkaŭe vindita en lankovrilon. Ordonportistoj kuregis tienreen, envolitaj en lankovrilojn, aŭ kion ili povis meti sur sin. La telefonoj sonoris, ĉiuj petis sian pantalonon, neniu povis akiri pantalonojn.

”Ĉu ne plu troviĝas pantalonoj en tiu ĉi lando?” ĝemis Plastiras.

Skrekka, la militministro fingrumis pri la franĝoj de sia delikata skota lankovrilo.

”Ekscelenca Moŝto”, li diris per trema voĉo, ”ne troviĝas pantalonoj en Arkina, ili ĉiuj malaperis.”

”Jes, sed la militprovizo, ulo!”

”Ĝi brulas!”

”Estingu do la fajron, kaj savu, kio estas ankoraŭ savebla.”

”Ankaŭ la fajrobrigado ne havas pantalonojn, nenio restis el ili, diris Skrekka kaj ĉagrenite klinis la kapon.

”Homo, ĉu vi komprenas, kion tio signifas? Sen pantalonon ni ne povas militi” kriis Plastiras. La viroj ĉirkaŭ li aspektis kolapsaj kaj senkonsilaj.

Dum Plastiras kaj liaj viroj alterne furiozis kaj transdonis sin al la plej senespera malĝojo, oni anoncis la viziton de Peneia.

Kiam ŝi enpaŝis, Plastiras kuris malantaŭ altapogan seĝon. Peneia ridetante ĉirkaŭrigardis en la rondo. ”Ŝajnas al mi” ŝi diris, ”kvazaŭ mankus la pantalonoj de la viroj.”

Plastiras konsternite alrigardis ŝin: ”Ĉu estas vi, kiu staras malantaŭ tiu ĉi kontraŭŝtata komploto, kiu puŝis nin en ĉi tiun humiligan situacion?”

”Jes” diris gaje Peneia, ”Mi kaj ĉiuj virinoj de Arkina.”

”Ĉu vi komprenas, ke per tiu ĉi malprudenta ago vi faligis sendefende la landon antaŭ la armeon de Ursina.

”Ankaŭ iliaj pantalonoj mankas”, ŝi, diris seke.

”Ĉu ankaŭ iliaj pantalonoj mankas?” Plastiras gapis.

”Jes!”

Plastiras kolapsis sur sia seĝo kaj fikse, kaj neniiginte rigardis antaŭ sin.

Fine li refirmigis sin. ”Ordonportisto” li diris kun malforta voĉo. La ordonportisto eksaltis kaj ĉirkaŭruliĝis en sia vindo. ”Jes” li diris kaj faris provon kunklakigi la kalkanojn kaj aspekti militeca.

”Sendu telegramon al Ursina. Skribu: ”Post zorga pripenso proponataj amikaj intertraktoj kun indiko al la antaŭaj koraj interrilatoj, Plastiras. Ĉu preta?”

”Jes, Ekscelenca, Moŝto!”

”Vi povas iri, ĉiuj povas iri.”

— — —

Plastiras neniam retrovis sin. Povas esti, ke ne estas sanige al landestro mon-

INSPIRO

GERALDO MATTOS el Brazilo, estas juna viro ankoraŭ sub 25 jaroj. Li estas unu el la plej multpromesaj talentoj de la originala esperanto-literaturo kun mirinda riĉo de formoj kaj sentoj. Krom pli-malpli longaj lirikaj poemoj li verkis la "Tento de junulo" kaj Ivano VI." (kvinakta versa dramo, historia).

*Se mi inspiron ne posedus
Por plekti el parol' girlandon,
Sincere en publikan standon
Nenian verson mi ekspedus...*

*Tapiŝo perla mi ne kredus
La junulinan harrubandon,
Se mi inspiron ne posedus
Por plekti el parol' girlandon...*

*Per miaj versoj mi nur tedus
la tutan muzamantan bandon
Kaj fine ĉi rondelan skandon
Neniam mi sukcese knedus,*

Se mi inspiron ne posedus...

tri sin sen pantalono. Li malaperis el Arkina, neniŭ scias kien. Kelkaj kredis, ke li establis virkonfekcian vendejon eksterlande. Sed tio estis kompreneble nur io, kion oni diris. La urbo situas alte, la freŝa aero tiriĝas de la montaro al

ĝi kaj ludas super la tegmentoj. Dum sunaj tagoj kolektiĝas arkinanoj kaj ursinanoj ĉe la rivero, kiu feliĉe ŝaŭman-te kunligas la du landoj.

El la dana: F. S.

POEMO



STIG CARLSSON (1914) sveda poeto kaj redaktoro. Unu el la iniciatintoj kaj gvidantoj de la t. n. Lirika Klubo, kies celo estas akceli la publikan intereson al la poezio. La klubo eldonas tutan serion de valoraj poeziaĵoj kaj ceterajn librojn pri poezio. La entrepreno fariĝis vera sukceso kun ĉ. 15.000 membroj, kun propra periodaĵo (Lyrikvännen — Amiko de liriko) sub la redaktado de Stig Carlsson.

Dediĉita al la kolekto "Svedlando helpas".

Estas tagoj, kiam ni manĝigas paserojn per freŝa bruna pano
kaj ili satmanĝas kaj fuĝas peze sub la arbojn.
Sur la vintra, longa glaciaro de Svedio ni ŝutas bonan grenon
al la elĉerpitaj marbirdoj.

Ni estas tiel humanaj kaj nian koron tuŝas la etuloj.
Estas noktoj, kiam ni vekiĝas en la mallumo kaj vidas — okulojn,
okulojn grandajn, brilajn, kiel lagoj de senfunda melankolio.
Kaj ni vidas longajn, ostajn membrojn etendiĝi al ni
simile al malplenaj demandoj, kiuj neniam atendas respondon.
De-fore ni aŭdas ĥoron da voĉoj el milionoj da gorĝoj:

brot bread du pain chleb pane brood chapati mien-pao bröd pano

Tra la tero oni aŭdas kanton pri pano, kiu estas la kanto pri libero.
Aŭskultu la kanton kaj memoru ĝiajn vortojn, ho homo.

Ĉar: nur estas unu mondo ĉio, kio spiras kaj fastas
kaj ne ekzistas libereco, dum la tiraneco de la malsato regas.
Devas veni la tago, kiam ĉiu homo sentime
povos leviĝi kaj diri: Nian ĉiutagan panon ni havas hodiaŭ.
Kion vi faras, ke tiu tago alproksimiĝu?

El la sveda: Astor Emanuelson



Vartado. Desegnis. A. Shingai, 12-jara. Japanio. (El la ekspozicio de SLEA.)

Ĝi prezentas ravan materialon el ĉiu parto de la mondo kaj estas klare, ke tia ekspozicio atingas i. a. tiun celon, kiun la Esperanto-akcelantoj fiksis: atentigon pri la forto kaj povo de Esperanto. La klubo de Karlskoga en Svedlando uzis similajn rimedojn por kolekti valoran materialon, kaj la ekspozicio longe okupis la atenton de la urbaj publiko kaj gazetaro.

Pasintjare oni aranĝis mondekspozicion de infandeseĝnaĵoj en Zagreb en kontakto de kongreso de infanpsikologoj. La loka Esperanto-organizo tre prudente disponigis siajn fortojn por la afero kaj

oni anoncis iaspecan konkurson por la infanoj. El eksterlando venis konsiderindaj valoroj; bedaŭrinde, kiel nin oni informis, la eksterlandaj infandeseĝnaĵoj ne estis prezentitaj en ekspozicio. Pri tiu ĉi materialo mankas ankoraŭ detala raporto, sed espereble iom post iom ĝi aperos. (Estas tre grave, agi akurate kaj zorge, ĉar finfine la celo de tiuj aranĝoj estas krei fidon pri idealismaj aferoj, pri kiuj oni havas emon malfidi, precipe, se ie ĝi ne prezentas sin centprocente senriproĉa.)

Ĉiuj tri menciitaj iniciatoj prezentas la saman formon: t. e. la formon de kon-



Serpentdresisto

*Desegnita de M. Pfister, 13-jara. Meknes, Franca Maroko.
(Partoprenis la ekspozicion, kiun aranĝis SLEA.)*

kurso. Esence tio signifas ideon de akuta veko de intereso ĉe la loko de la aranĝo, kontraŭvaloron, aŭ egalvaloron ne ĉiu sendinto ricevas. Tia aranĝo havas siajn avantaĝojn, kaj certe plenumas sian celon, sed ĝia bazo ne estas interŝanĝo. La ekspozicio certigas grandskalan intereson, sed tempe ĝi estas limigita. La manko de la ĝenerala interŝanĝo povas rezulti ankaŭ mankon de la materiala pleneco. Ni scias pri okazoj, kie la aranĝoj surbaze de nura enkollekto de la infandeseĝnaĵoj, malgraŭ la granda internacia propagando, estis relative malmulte efikaj.

Sed oni povas interŝanĝi!

Antaŭ tri jaroj ni aranĝis la unuan interŝanĝon: lernejo en *Borås* ŝanĝis desegnaĵojn kun lernejo en *Amagasaki*. La desegnaĵoj de la japanaj infanoj estis impulsaj, kolorriĉaj, plenaj de vivĝojo kaj la ekspozicio, aranĝita en la lernejo en *Borås* eĥis vaste en la gazetaro kaj en la publiko. Laŭ la alvenintaj japanaj gazetoj aliaj kvalitoj de la svedaj infandeseĝnaĵoj vekis simile grandan atenton en la japana urbo. La infanoj, kiuj sendis al Skandinavio siajn desegnaĵojn, sentis sin inspiritaj, ofte ili skribis salutojn al siaj kamaradoj en *Borås* kaj inter aliaj troviĝis eta esperantisto, kiu skribis sur sian desegnaĵon: "Vivu Svedlando!"

Tiu ĉi kolekto venis kun tre klaraj notoj pri aĝo, sekso, klaso ktp, de la japanaj infanoj, kaj ankaŭ kun ceteraj klarigoj, kiam temis pri io speciale japana. Ĉio en bona Esperanto. (Dank' al s-ano *Haruja Maekajna*.) — En la sekvinta jaro ni organizis tiajn interŝanĝojn kun pluraj landoj, i. a. kun Islando, Aŭstralio, Brazilio, Urugvajo, Italio, Francio.

Kion tiuj interŝanĝoj signifas el kultura vidpunkto, pri tio ni povos raporti pli sube en kontakto kun la plej lasta sendaĵo. El esperantista vidpunkto ĝi

signifas *daŭran* pruvadon pri la kulturcelado de Esperanto, kaj specialan atenton de la instruistaro, kiu en tiu ĉi lando emas malatenti nian movadon. Oni povas sperti, ke la bagateligaj mangestoj pri nia lingvo pli kaj pli maloftiĝas inter la instruistoj. Nun jam ankaŭ la mezlernejoj komencas interesiĝi pri la interŝanĝoj.

La favoro de la interŝanĝo estas, ke ĝi nepre donas valoron ambaŭflanken; ĝi estas pli kolektiva entrepreno kaj samtempe la tuta aranĝo restas "intima".

Silvio Pellico kaj Engelbrekt

Silvio Pellico estis itala instruisto kaj verkisto. Siatempe li estis unu el la flagportistoj de la libereco. Dum sia vivo li estis mortkondamnita de la aŭstroj, poste tamen nur karcerulo dum ok jaroj. Nun 100 jarojn post lia morto stratoj, lernejoj portas lian nomon, i. a. ankaŭ elementa lernejo en Torino. — *Engelbrekt*, la norda pioniro de la kontraŭdiktatoraj tendencoj, donis nomon al popollernejo en *Borås*. Tiuj ĉi du lernejoj kontaktiĝis dum tiu ĉi jaro kaj ambaŭflanke oni plezure ekpreparis la materialon de la infandeseĝnaĵoj.

Ĝis nun la interŝanĝoj ne okazis laŭ certa principo; ĝenerale tamen oni sendis la desegnaĵojn de certaj aĝoj. La lernejoj ricevis nur bonajn verketojn. La instruistoj de la lernejo *Silvio Pellico* proponis, ke la du lernejoj ŝanĝu laŭ fiksjaj principoj: t. e. ke oni sendu la verkojn *de tuta klaso* en tiu maniero, ke ĉiu infano — de la plej lerta ĝis la plej mallerta — sendu sian desegnaĵon en ĉiu desegna grupo. Pri la grupoj ni tuj parolos. Alvenis do ĉ. 150 desegnaĵoj — mirinde altnivelaj — en sep grupoj; verkoj de 9—10 jaraj knabinoj. La grupoj prezentas naturdesegnon, pli ĝuste koloran bildon de floroj kaj birdoj (laŭ muzeaj modeloj),

ilustradon de itala poeziaĵo, kies tekston oni sendis en Esperanto, fantaziajn prezentadojn pri Karnavalo, pri fojnrinkolto kun utilaj informoj pri la naturo de Norda Italio, pri liberaeraj ludoj kaj fine fabelilustraĵoj, kiuj lastaj pruvas, ke la fabeloj estas tute internaciaj (temas pri Ruĝĉapinjo kaj Dornrozeto).

Laŭ la akompana letero la desegnaĵoj estas aŭtentikaj...-ilin la infanoj faris en la lernejo dum desegna leciono. Ili estas pretigataj per necesa ekzercado al rimarkado, al pripenso... pri la temoj. La celo: kutimigi la lernantojn al atenta observado de ĉio, kio ilin ĉirkaŭas, per efika esprimo de la desegnado.

Kio estas libera aero?

Tia sistema kolekto de infandeseĝnaĵoj estas senlime interesa precipe por pedagogoj, sed ne malpli instiga por la infanoj. Por ĝenerala publiko kompreneble estas la plej interesaj tiuj desegnogrupoj, kiuj prezentas la ludon de la fantazio aŭ prezentas la diferencecon de la cirkonstancoj. Tiurilate ni povas citi la komenton al la grupo "ludoj en la libera aero": "Multajn certe vi konas: ŝnursaltadon, bicikladon, pilkludojn. Rimarku tamen italan strandon kun larĝaj sunombreloj (kiel en Riviero): tiuj knabinoj estas el riĉaj sociaj tavoloj kaj evidente pasigis la someron ĉe la marbordo.



*Infantendaro. Desegnis
Fusako Imase (8 j.) en
Amagasaki.*

Por aliaj, malriĉaj knabinoj *libera arco* signifas nur malhelan domkorton: vi rimarkos ĉe S. I. tre klaran bildon de tipa, malriĉa domo en Torino: centre la pordego de la strato gvidas al la korto: longa interna "balkonirejo" (malfermita koridoro) estas komuna al pluraj familioj."

Tiu ĉi ekzemplo tre klare montras, ke la bildinterŝanĝo prezentas diversajn aspektojn kaj konkludoj estas fareblaj en multaj direktoj. La desegnado havas intiman kontakton kun la fantazio, aĝemo kaj produktemo de la infanoj.

Ni havis okazon fari kelke da demandoj al la estro de la koncerna sveda lernejo, s-ro *Carl Andersson*. Li resumis sian opinion en la jenaj frazoj:

"Laŭ mia opinio tia metoda interŝanĝo superas ĉiujn aliajn ĝis nun aplikitajn metodojn. Vidante la tutan kolektivajn laboron la pedagogoj povas fari gravajn konkludojn, kaj ricevas utilajn impulsojn en sia plua laboro. Ankaŭ por la infanoj ne estas indiferece, ke ili vidas ne nur la verkojn de la plej bonaj, kio ja povus vekti en ili iaspecan komplekson de malplivaloro, nun ili komprenas, ke iliaj malproksimaj kamaradoj ne estas nur majstroj. Cetere en la konkreta okazo ni devas nepre konfesi, ke tiuj ĉi italaj knabinetoj reprezentas tre altan desegnan kulturon, kelkfoje tute surprizan."

— Kian impreson la desegnaĵoj faras al la infanoj?

"Ili akceptis la desegnaĵojn kun entuziasma intereso kaj admiro. Entute la efiko estas inspira kaj utila. Multe da detaloj vekas ilian intereson, la desegnaĵoj tuŝas diversajn sferojn de la scio kaj scivolo. Unu el la plej gravaj efikoj estas, ke la infanoj konsciiĝas pri la pli granda kolektivo, pri la mondo mem, kaj sentas sin apartenantaj al ĝi. Ili serĉas similecon kaj rimarkas ankaŭ la diferencojn, tamen

sen ia sento de malamikeco. Tia interŝanĝo de desegnaĵoj estas iaspeca streĉa aventuro."

Iom poste ni demandis ankaŭ la koncernan fakinstruiston, s-ron *Torsten Erséus* pri siaj spertoj. Liaj vortoj grandtrajte substrekas la opinion de la lernejestro. Ankaŭ laŭ lia opinio la ekspozicio estas tre instiga kaj instrua, sed li aldonas, ke ekzistas sufiĉe granda diferenco inter la art-instruado en Italio kaj en Svedlando. La italaj desegnaĵoj estas tre bonaj, ilia detalemo vekas admiron ĉe la svedaj infanoj, kies instruado nuntempe montras alian vojon.

Laŭ kiuj principoj oni instruas la novan generacion en Svedlando?

Jen la respondo:

— La celo de nia desegna instruado estas gvidi la infanon, ke ĝi prezentu per bildoj, kiel ĝi perceptas la ĉirkaŭan mondon — ke la infano donu esprimon al sia fantazio. Per tia instruado vekigatas la konscio, interesiĝo de la infano pri bona arto, ĉu en la formo de pentraĵoj, skulptaĵoj, aŭ slojdlaboro arta.

Per tio kiel fono, mi klopodas en mia instruado en la tria klaso (9—10 j.) atingi, ke la infanoj ne profundiĝu en la detaloj, sed ili klopodu kapti la tuton, ian kompletecon, ke ili klopodu eluzi la tutan bildsurfaco. Komence la afero ŝajnas esti malfacila al la infanoj, sed ili ĝenerale rapide trovas sian novan stilon. Por facile atingi tion, ni uzas nek liniilon nek viŝgumon. La infanoj konstatas baldaŭ, ke la "verko" ne perdas per tio, sed anstataŭe gajnas, kaj ĝi ricevas aeron por si. Ni laboras plejparte per akvarelo. Per tia rimedo la infanoj povas doni liberan fluon al siaj pensoj al la plej viglaj koloroj; por tio la akvarelo estas la plej konvena materialo. Tiu tempeto, kiu estas necesa por instrui la infanojn

manipuli per tiaj farboj, bone kompensiĝas per la kolorgaĵo, kiu iom post iom elkreskas.

La motivaro de la diversaj taskoj venas parte el la aliaj studoj, tiel ke specialaĵoj klariĝas pli bone per tio, parte el la medio kaj fantazio. Rekta kopiado de bildoj estas evititaj. En la komenca periodo oni neniel korektas la verkojn de la infanoj; la propra maniero de la infana desegno devas validiĝi. La sola tasko de la instruisto post la unua instruo pri la uzota materialo, montri vivan, sed ne sintrudan intereson por la laboro de la infano. Plej ofte ni nur konsilas. Per tio la kapablo de la infano memstare solvi la ricevitan taskon, t. e. disponi pri la bildsurfaco, ekzerciĝas kaj evoluas.

Psikologio kaj infandeseĝno

La kolektado kaj la analizo de la infandeseĝnaĵoj pli kaj pli ampleksiĝas. Ekzemploj: En Montevideo ekzistas speciala sekcio en la Nacia Biblioteko por infandeseĝnaĵoj. En Zagreb oni metode kolektas la materialon kaj same metode oni prilaboras kaj analizas ĝin.

Facile atingebla verketo estas por ni la 44-paĝa psikologia studo de Asari—Atsushi: *Vorto de senkonscio*, t. e. eseo pri la signifo de koloroj kaj simboloj per kiuj la infananimo prezentas sin en la deseĝnaĵoj. La verketon eldonis Studgrupo de Infandeseĝnaĵoj. Sannoche cho 171. Morioka, Iwate-ken, Japanio.

Infanoj povas instrui nin pri multo.

F. S.



*Indiĝena danco. Deseĝnaĵo de H. J. Johns Adeladie. Aŭstralio.
El la ekspozicio de SLEA*

EL LA EKSPOZICIO DE SLEA



Por kolekti manĝeblajn kreskaĵojn. Seok Ju Oh, 15-jara. Kunsan, Koreo.



Emuo. Graeme Murraï 8-jara. Sydney, Aŭstralio.



Pomriko. Johann Bubich, 11-jara. Eisenstadt, Aŭstrujo.

al miaj gepatroj

GUSTAF MUNCH PETERSEN (1912—1938), studento kaj laborista surrealistma pentristo. Senlaca serĉanto kaj analizanto de sia memo. La perforto naŭzis lin; libervole li aliĝis al la kontraŭfaŝisma fronto dum la hispana interna milito kaj mortis tie.

*mi ne fariĝis tia, kian vi atendis —
mi fariĝis ĉio, kion vi timis —
vi kreskigis min
per propra rezigno.
Vi edukis min
per kaŝitaj larmoj —
edukis min
vivi vian vivon — daŭrigi ĝin.
ĉu mi diru:
tiel vi vivis; vi agis prave —
do indas vivi tiel?
aŭ ĉu mi mortigu la esperon en vi?
rakonti al vi, ke mi ne fariĝis tia,
kia estis vi —
ke mia mondo ne estas via,
mia ĝojo
mia doloro aliaj ol viaj —
ĉu vi kredos mian dankon al vi?
mian dankon al la vivo?
aŭ ĉu vi diros:
li ricevis ĉion,
li prenis de ni ĉion
kaj redonis nenion
krom malĝojo kaj ĉagreno.
mi scias, ke vi pravas dirante tiel.
mi kredas, ke mi pravas,
kiam mi iros al mia propra lando,
sed mi iras bezite —
mi iras malrapide kaj peze —
sed mi kredas, ke mi devas iri.*

(El la "Rozoj kaj Urtikoj").

El la dana: Poul Thorsen.

LA ESPERANTO STATUO DE GOTENBURGO

Estas konate, ke laŭ la laŭdinda iniciato kaj persista laboro de Allan Kramer, la urba konsilantaro de la dua sveda urbo decidis bapti unu el la centraj placoj ESPERANTOPLATSEN (Esp. placo).

Por ornami la placon oni anoncis konkurson internacian per la Esperantogazetaro. Ĝis nun alvenis dekdu projektoj, el kiuj almenaŭ tri estas konsiderablaj; oni esperas, ke pluaj projektoj venos. Sur nia titolpaĝo estas videbla unu el la konkursaj kontribuoj, la verko de Frida Christaller, Stuttgart.

La "Esperantoalianco" en Gotenburgo decidis fondi "Föreningen Esperantostatyn i Göteborg" (Societo "Esperantostatuo" en Gbg), kies celo estas kolekti kaj prizorgi la ekonomiajn kontribuojn por la realigo de la plano. Dum la grandpublika kunveno de la gotenburga esperantistaro, la 7-an de januaro ĉijare oni elektis kvinmembran estraron, reprezentanton Allan Kramer, direktoron E. W. Anjou, komerciston Eric Ekström, mezuriston Allan Gartman kaj instruiston Oskar Svantesson.

La *alvoko* de la Sveda Esperanto Instituto diras i. a. la jenajn:

"Laŭ la propono de la lokaj Esp. kluboj decidis la urba konsilantaro en Gotenburgo la 11/3, 1954 doni la nomon "Esperantoplatsen" al nun elformiĝanta placo... Gotenburgo estas la unua en Skandinavio, kiu donas sian subtenon al la Esperanta-ideo same kun ideala kiel racia indiko.

Por akcenti la karakteron de la placo oni proponis dekori ĝin per statuo kiu ne nur simbolus la universalecon de la Esperanto-ideo, sed ankaŭ kontentigus altajn pretendojn laŭ siaj arta kaj estetikaj elformado. Ĉar la placo estos tre vigle trafikata, arta verko meze de la placo vekos konstante la atenton de la preterpasantoj kaj por la estontaj tempoj ĝi staros, kiel simbolo de la komuna internacia lingvo.

Ni turnas nin al ĉiuj intersemuloj kontribui al tiu ĉi artaĵo. La kostoj estas kalkulitaj ĉ. 20.000 kr. Kontribuo estas sendebla per poŝtĝiro 42 92 82. "Föreningen för esperantostatyn i Göteborg" aŭ donacebla laŭ la numeritaj listoj de tiu ĉi societo.

La alvokon subskribis la prezidanto de la estraro, Ernst Eriksson kaj rektoro Karl Söderberg.

La kolekton aprobas Ernst Jungen, la prezidanto de la Urba Konsilantaro en Gotenburgo, Harry Hjärne, ĉefredaktoro de Göteborgs-Posten, Helge Berglund, urba konsilisto, Stockholmo, Jan Strönne, revizoro de la Regna Banko.

La estraro de la nova societo turnas sin al la enlandaj esperanto-societoj por havigi al si listojn kaj subteni la kolekton. Ankaŭ unuopuloj povas partopreni en tiu ĉi laboro, se ne troviĝas Esp. societo en la komunumo.

Informojn donas: Allan Kramer, Gibraltarargatan 64, Göteborg S.

ENERGIO KAJ LA TERO*

Oni povas imagi la sunsistemojn kiel gigantajn atomojn. Nia suno estas granda atomkerno, al kiu la planedoj (ankaŭ nia Tero) kiel elektronoj firme apartenas. Per tio ni povas klarigi la ekeston kaj la funkciadon de la sunsistemo, ĉar ni konas la strukturon kaj la vivon de la atomoj.

La potenca energio, radianta el la Suno, efikas sur eliptika vojo, kiu havas kunligon kun la eliptika vojo de nia Tero. La emananta energio atingas nian planedon plej efike ĉe la ekvatora regiono. Tie ĝi enpenetras ĝin. Ĝi daŭrigas sian vojon kaj forlasas la Teron ĉe la arktaĵaj regionoj por reveni al la Suno.

Tiu ĉi efiko krom la ceteraj movoj kaŭzas ion novan, ĝis nun ne esploritan movon en la materio de la Tero. La forto, enpenetranta ĉe la ekvatoro, kune kun la varmigo kaj aliaj efikoj, movas la tutan materion (mason) de la Tero tre malrapide. La ĝis nun ne klarigita Norda Lumo aperas kiel la efiko de la movo kaj eliranta energio.

La movenergio premas internen la mason de la Tero ĉe la ekvatora regiono. Tio daŭras ankaŭ en la interno de la

Tero al la polusoj. Tie, venante al la surfaco, ĝi plu premiĝas, ĉifiĝas al la direkto de la ekvatoro. La cirkla movo estas konstanta.

La rezulto estas la montaroj paralelaj kun la ekvatoro, kiuj estas plej kompletaj ĉe la moderklimata terzono; kvazaŭ lasta ekflamo antaŭ la lasta enĉifiĝo kaj englutiĝo. Kontinentoj, maroj, vulkanoj leviĝas, funkcias kaj dronas.

Kun tiu ĉi kono ni povas percepti la montkronitan basenon de Hungario kiel vastan vulkanon post vivfunkciado. Ankaŭ la etendiĝo de la glacikovro en la glacia epoko estas klarigebla per tio.

Sonas paradokse, sed tamen ne la glacio konkeris ion el la surfaco de la Tero, sed de sub la preskaŭ konstanta glacikovrilo la supra materio de la Tero simple ekmoviĝas al la ekvatoro, kaj ankaŭ nun la Tero glitas de sub la glacia kovrilo.

Tiu ĉi teorio havas pluajn argumentojn, pri kiuj eble mi povos paroli alian fojon.

* Ni ricevis tiun ĉi originalan teorion el Hungarlando. (Samtempe aperinta en HEROLDO DE ESPERANTO.)

Pensia aĝo en diversaj landoj

Irlando, Norvegio	70	j. same por ambaŭ seksoj
Svedlando	67	(65 por virinoj)
Finnlando, Okc. Germanio, Luksemburgo, Nederlando, Polio, Portugalio, Svisujo	65	
Belgio, Danlando, Anglio, Grekio, Austrio	65	60 por virinoj)
Francio, Sarlando, Ĉeĥoslovakio kaj Turkio	60	
Albanio, Bulgaria, Italio, Sovetio kaj Hungario ..	60	(60 por virinoj)
Jugoslavio	55	(50 por virinoj)

Estas malfacile fiksi la plej konvenan aĝon por pensiĝo, diras la Internacia Labor-Organizo, sed unu afero estas tre grava: neniu lando rajtas krei pensian leĝon, kiun ĝi ne povas plenumi.

MARISTA LULKANTO*

EVERT TAUBE (1890). Apartenas al la ne maloftaj svedaj talentoj, kiuj eminentas en pluraj artifformoj. Komponisto, aŭtoro de tekstoj al siaj melodioj. (Oni povas supozi, ke la melodioj naskiĝas ĉe li unue kaj poste la same virtuozaĵaj tekstoj). Li eĉ ilustras siajn verkojn. Unu el le plej multe vojaĝintaj svedoj. Bravuro, humoro, natursento kaj vivĝojo estas karakterizaj ĝenerale pri liaj verkoj.

*Lul — lal — lul', la kaldrono sur brul',
alvenas tri migrantoj survoje,
unua, ve, lamul',
la dua, ho, blindul',
la tria ne povas paroli.*

*Lul — lal — lul', la kaldrono sur brul',
ĉiele migradas tri steloj,
unua blankas jen,
la dua ruĝas jes,
la tria estas luno, la flava.*

*Lul — lal — lul', la kaldrono sur brul',
blovadas tri ventoj surmare,
sur Granda Ocean'
sur eta Skagerak'
kaj longe for en golfo Botnia.*

*Lul — lal — lul', la kaldrono sur brul'
veladas tri ŝipoj suronde.
unua estas bark',
la dua estas brig',
la tria havas velojn ĉifonajn.*

*Lul — lal — lul', la kaldrono sur brul',
ŝipkest' havas tri figuretojn,
unua estas kred'
kaj dua la esper',
la tria estas amo, la tre ruĝa.*

(El la sveda: Magda Carlson)

*) Aperis en la "Sveda Poemaro".

POSTTAGMEZO

ERIK LINDORM (1889—1941), sveda poeto; karakterizaj pri li estas la intimaj agordoj de la hejmo, kiel ankaŭ en ĉi tiu poemo.

*Fajro krakas. Ekster la dom'
aŭtuna pluvo faladas.
El kuirejo susura son':
lia edzino gladas.*

*Pordbato, bruo, tondro, fulm'!
L' infanoj ĉambrom lavangas,
neniu muta, nek sen pulm'
kaj neniu el ili mankas.*

*Sed pasas la tago al dorma vesper'
kaj forne cindro grizblankas.
Kaj post nelonge ne estos ver':
"neniu mankas."*

El la sveda: Magda Carlsson, (Sveda Poemaro).

Kumbel

SONĜO-GRUKO* EN LA FASTA TEMPO

PIET HEIN (1905) Pseŭdonimo Kumbel Kumbell. Karikaturisto kaj verkisto. Plej konata pro etaj epigramoj (*gruk*), kies koncizeco kaj surpriza fino efikas kiel pike forta spico. P. H. estas ankaŭ cetere tre atentinda lirika talento. Li estas dano.

*Mi sonĝis en tempo de karnaval'
pri brila, eksmoda maskobal'
kun tuta publiko maskita.
Sen masko venis la vero nur,
kaj ĉiuj post nun rigardo sur
la trajtoj deklaris: "Ho, kia plezur'!
Jen estas mensog' kamuflita."*

El la dana: Poul Thorsen

* filigrana poemo.



La statuo de H. C. Andersen en Kopenhago. (Skulptisto: August Saabye, 1823—1916).

POETO KAJ POPOLO

Hans Christian Andersen en socia perspektivo

Kompilita de Poul Thorsen

Tra la literaturo de ĉiu popolo zigzagas fendego inter popola kaj akademia mondo. Sentema leganto tuj rimarkas al kiu mondo apartenas verkisto, kaj en sentema artisto ofte ekestas grava konflikto pro la medio. Tiel estis por H. C. Andersen.

Kiel 14-jara malriĉulo li venis al Kopenhago, sola, sen familio aŭ konatuloj. Sed spite al la malhela perspektivo, en tiu dato (6. 9. 1819) ekfandiĝis lia famo, kaj li poste ĉiam festis ĝin kvazaŭ naskiĝotagon. Li avidis famon — ne nur pro ia vanto, sed ĉar li sentis, ke famo estas la sola vojo el lia deprimita kaj povra vivstato.

Kiel en fabelo liaj revoj efektiviĝis, en kaj la intelekta kaj socia mondo. Li fariĝis bonhava, ŝtata konsilisto kaj honora civitano de la hejmurbo Odense. Sed la fendego ekzistas, kaj transiro ne povas okazi sen certa pago. Poeto el la plej malalta popoltavolo, tiam kiel nun, nur povis grimpi la socian ŝtuparon sin adaptante al la burĝaj kondiĉoj, t. e. pli malpli nei sian pli fruan medion.

En kelkaj leteroj de Andersen oni vidas vualitan reflektan de la vidpunktoj de liaj mecenoj kaj nobelaj konatuloj. Foje li eĉ frontas la postulojn de laboruloj. Ekz. en letero kun respondo rilate la seriozan masonistan strikon 1872:

”Mi malĝojas, ke tiaj movadoj povis ekesti en la tiom trankvila kaj tute bonkora dana popolo.”

Verŝajne pro samaj kondiĉoj nur aperis kun 28-jara malfruiĝo lia akra, kontraŭ-absolutisma fabelo ”La malbona suvereno”.

La satiristo M. A. Goldschmidt, estiminda kaj klarvida ĉefo de la tiutempa intelekta rezisto kontraŭ absolutismo, hipokriteco kaj burokrateco, skribis amaran recenzon (pri ”Bazaro de poeto”) en sia timita revuo ”La Korsaro” 1842:

”De H. C. Andersen, kiu venis el la popolo, kiu mem batalis pezan lukton de mizero kontraŭ riĉo, kiu vidis en la okulojn de subpremo, ni atendis kunsenton al la popolo, al ĝia mizero kaj subpremo. Almenaŭ kelkajn tremajn ekprenojn sur la kordoj ni atendis de de tiu popole naskita poeto, kiu tramigris Germanion, Italion kaj la subjugigitan Orienton... Sed H. C. Andersen nur priskribis la brilon de suno kaj maro aŭ la pompon de l’ebenoj. Efektive! Al mortaj ŝtonoj li donis vivon. Sed al li la vivo de l’popoloj nur estas morta ŝtono.”

Kaj tamen la fabeloj de Andersen estas konataj en la tuta mondo kaj ŝatataj eĉ precipe inter neriĉuloj. La supra juĝo sekve nur povas estis supraĵe vera kaj eĉ iomete maljusta. Se Andersen, kiel deziris Goldschmidt, perdiĝus en hejmaj kvereloj, li kredeble nun estus forgesita. Lia perspektivo estis multe pli granda ol tiu de liaj kritikistoj. Genie li konsciis, ke ĝuste *la fabelo* estas klasika esprimilo de ĉiuj popoloj tra ĉiuj epokoj. Do, en la fabeloj Andersen tute donis sin mem parolante, senkompare, samtempe al infanoj kaj plenkreskuloj. Kia kontrasto inter li kaj iliaj recenzistoj post apero de la unuaj fabeloj en 1835:

Ili morale riproĉis, ke princino kisas soldaton (”Fajrilo”), ke bienulino regas

LA NAJTINGALO

En Ĥinujo, kiel vi sendube scias, la imperiestro estas Ĥino kaj ĉiuj liaj ĉirkaŭantoj estas ankaŭ Ĥinoj. De post la tempo, pri kiu mi rakontos al vi, pasis jam multe da jaroj, sed ĝuste tial valoras aŭskulti la historion, ĉar alie oni povus ĝin forgesi. La palaco de la imperiestro estis la plej belega en la mondo, ĝi estis tute el delikata porcelano, tiel multekosta, sed ankaŭ tiel rompebla, tiel tuŝotima, ke oni devis ĉiam esti tre singarda. En la ĝardeno oni povis vidi la plej rimarkindajn florojn, kaj al la plej belaj el ili estis alligitaj arĝentaj sonoriloj, kiuj senĉese sonoradis, por ke oni ne povu preteriri, ne rimarkante la

florojn. Ĉio en la ĝardeno de la imperiestro estis aranĝita plej sagace, kaj la ĝardeno estis tiel grandega, ke eĉ la ĝardenisto ne sciis, kie estas ĝia fino. Fervore marŝante, oni venadis el la ĝardeno en plej belegan arbaron kun altaj arboj kaj profundaj lagoj. La arbaro kondukis al la maro, kiu estis blua kaj profunda. Grandaj ŝipoj povis naĝi sub la superpendantaj branĉoj, kaj en tiuj lastaj loĝis najtingalo, kiu kantadis tiel dolĉe, ke eĉ la malriĉa fiŝkaptisto, kiu tute kaj plene estis okupita de sia profesio, silente kuŝiĝadis kaj aŭskultadis, kiam li, elveturinte en la nokto, por etendi sian reton, aŭdis la najtingalon. "Mia Dio, kiel

instruiston, kiam la edzo forestas ("Malgranda Niko kaj granda Niko"), ke "Reĝidino sur pizo false kredigas al infanoj, ke tia altrangulino ĉiam estas tiel terure delikathaŭta" ktp.

Sed Andersen neniam cedis al sofistoj. La fabeloj estis *lia* formo. Nur ili liberigis en li la plej delikatajn kvalitojn: humoro, gajo, sprito, ironio kaj satiro. Vidu la fabelojn "La novaj vestoj de la reĝo" kaj "Estas tute certe".

En "Konkurso de saltado" Andersen montras eĉ ribelemon al sia nova medio. fabeleto en sia ĉarma formo liveras penetran sarkasmon pri nepotismo kaj snobemo antaŭ ordenoj ("silentigiloj").

"Ombro" estas skurĝado al epigonoj (imitantoj de arto kaj scienco), kiuj parazite alproprigas al si, kion pene, dolore kreis veraj artistoj, kaj kiuj redonas ĉion

en groteska, pseŭda formo. Jen multe pli akra karikaturo de dana burokrateco ol kapablis doni la ĉefkarikaturisto Goldschmidt mem! — Tiel freŝe ĉio staras en tiuj du "fabeloj", ke eĉ hodiaŭ oni povas enmeti aktualajn nomojn.

Rekta, realisma, senkompromisa batalo kontraŭ sociaj misaĵoj estis kontraŭ la tuta volo kaj delikata naturo de H. C. Andersen. Sed li atingis per siaj bizaraj fabel-figuroj plenan efikon. Sendube ĉiu plenkreska infano, kiu memoras fabelojn kiel "Ŝi estis tute sentaŭga", "La najtingalo", "La malbela anasido" aŭ "Knabino kun alumetoj" havas vivan impreson, ke Andersen spite al sia akirita burĝeco konservis en konsiderinda parto de sia verkaro la perspektivon de mal-supre, t. e. la perspektivo socia de lia amata, povra popolo.

bela ĉi tio estas!” li diradis, sed baldaŭ li estis devigata zorgi pri sia profesio, kaj li forgesadis la birdon. Sed kiam la najtingalo de la sekvanta nokto denove kantis kaj la fiŝkaptisto tien venis, li ripetadis: ”Mia Dio, kiel bela ĉi tio estas!”

El ĉiuj landoj de la mondo venadis vojaĝantoj en la urbon de la imperiestro kaj admiradis ĝin, la palacon kaj la ĝardenon; sed kiam ili aŭdis la najtingalon, ili ĉiuj diradis: ”Tio ĉi tamen estas la plej bona!”

La vojaĝantoj rakontadis pri tio post sia reveno hejmen, kaj la scienculoj verkis librojn pri la urbo, pri la palaco kaj pri la ĝardeno, sed la najtingalon ili ne forgesis, al ĝi estis dediĉita la ĉefa ĉapitro; kaj tiuj, kiuj sciis verki versojn, verkis plej belajn poeziaĵojn pri la najtingalo en la arbaro apud la profunda maro.

La libroj estis tradukitaj en ĉiujn lingvojn, kaj kelkaj el tiuj libroj unu fojon trafis ankaŭ en la manojn de la imperiestro. Li sidis en sia ora seĝo, legis kaj legis kaj balancadis ĉiuminute la kapon, ĉar estis al li agrable sciigi pri tiuj belegaj priskriboj de la urbo, la palaco kaj la ĝardeno. ”Sed la najtingalo estas tamen la plej bona el ĉio!” estis skribite en la libroj.

”Kion ĉi tio povas signifi?” diris la imperiestro. ”La najtingalo? Ĝin mi ja tute ne konas. Ĉu ekzistas tia birdo en mia regno kaj en mia propra ĝardeno? Pri tio mi neniam aŭdis! Kaj pri io simila mi sciigis nur el la libroj!”

Li alvokis sian kortegestron, kiu estis tiel eminenta, ke ĉiufoje, kiam iu malpli altranga ekparolis al li aŭ kuraĝis de-

mandi lin pri io, li respondadis nenion krom ”P!”, kaj ”P!” ja nenion signifas.

”Oni ja rakontas, ke ĉi tie troviĝas eksterordinarie rimarkinda birdo, nomata najtingalo! — ekparolis al li la imperiestro. — Oni diras, ke ĝi estas la plej bona objekto en mia granda regno! Kial oni neniam ion diris al mi pri ĝi?”

”Mi neniam antaŭe aŭdis pri ĝi!” diris la kortegestro; ”ĝi neniam estis prezentita en la kortego!”

”Mi ordonas, ke ĝi hodiaŭ vespere venu ĉi tien kaj kantu antaŭ mi!” diris plue la imperiestro; ”la tuta mondo scias, kion mi havas, kaj mi ĝin ne scias.”

”Mi neniam antaŭe aŭdis pri ĝi!” respondis la kortegestro, ”sed mi ĝin serĉos, mi ĝin trovos!”

Sed kie oni povis ĝin trovi? La kortegestro kuradis supren kaj malsupren sur ĉiuj ŝtuparoj, tra salonoj kaj koridoroj, sed neniu el tiuj, kiujn li renkontis, iam ion aŭdis pri la najtingalo, kaj la kortegestro kuris returne al la imperiestro kaj diris, ke ĝi estas verŝajne fabelo de la libroverkistoj.

”Via imperiestra moŝto tute ne povas prezenti al si, kiaj diversaj mensogoj estas verkataj. Ĉio ĉi tio estas fantazioj kaj apartenas al la tiel nomata nigra magio!”

”Sed la libro, en kiu mi tion ĉi legis,” respondis la imperiestro, ”estas sendita al mi de la altepotenca imperiestro de Japanujo, kaj sekve ĝi ne povas esti malveraĵo. Mi volas aŭdi la najtingalon! Ĝi nepre devas esti hodiaŭ vespere ĉi tie! Ĝi havas mian plenmoŝtan favoron! Kaj se ĝi ne venos, tiam mi ordonos piedpremi

la ventrojn de iuj korteganoj tuj post ilia vespermanĝo!”

”Tsing-Pe,” diris la kortegestro, kaj li ekkuris denove supren kaj malsupren sur iuj ŝtuparoj, tra iuj salonoj kaj koridoroj. Duono de la kortego kuris kune kun li, ĉar ili ne tre volis lasi al si piedpremi la ventrojn. Tiam komenciĝis fervora demandado pri la rimarkinda birdo, kiun konis la tuta mondo, sed nur neniu en la kortego.

Fine ili trovis malgrandan, malriĉan kuirejan knabineton. Ŝi diris ”Ho Dio, la najtingalo! Mi bone ĝin konas! Jes, kiel bonege ĝi kantas! Ĉiuvespere oni permesas al mi forporti por mia bedaŭrinda malsana patrino kelkajn restaĵojn da manĝaĵoj; ŝi loĝas malsupre apud la bordo de la maro; kaj kiam mi iras returne, estas laca kaj ripozas en la arbaro, tiam mi aŭdas la najtingalon. Tiam larmoj staras en miaj okuloj kaj mi havas tian senton kvazaŭ mi kiskus mian patrino!”

”Malgranda kuireja knabineto!” diris la kortegestro, ”ni havigos al vi konstantan oficon en la kuirejo kaj permeson vidadi, kiel la imperiestro manĝas, se vi povas konduki nin al la najtingalo, ĉar estas ordonite, ke ĝi hodiaŭ vespere venu por kanti!”

Post tio ili ĉiuj elmarŝis al la arbaro, kie la najtingalo ordinare kantadis; duono de la kortego partoprenis en la marŝado. Kiam ili tramarŝis pecon de la vojo, subite bovino komencis bleki.

”Ho!” diris unu kortegano, ”jen ni ĝin havas! sidas efektive tute eksterordinara forto en tia malgranda besteto. Mi certe ĝin iam antaŭe aŭdis!”

”Ne, tio estas bovinoj, kiuj blekas!”

diris la kuireja knabineto; ”ni estas ankoraŭ tre malproksime de la ĝusta loko!”

Poste ekblekis ranoj en la marĉo.

”Belege!!” diris la ĥina palaca predikisto; ”nun mi ĝin aŭdas; tio ĉi sonas ĝuste kiel malgrandaj sonoriletoj de preĝejo!”

”Ne, tio estas ranoj!” diris la kuireja knabineto; ”sed nun mi pensas, ni baldaŭ ĝin aŭdos.”

Subite aŭdiĝis trilado de la najtingalo.

”Jen ĝi estas!” ekkriis la knabineto; ”aŭskultu, aŭskultu, kaj jen tie ĝi sidas!” kaj ŝi montris en la direkto la malgranda griza birdo supre en la branĉoj.

”Ĉu ĝi estas ebla!” diris le kortegestro, ”tia mi neniam ĝin prezentus al mi! Kian simplan eksterajn ĝi havas! ĝi certe paliĝis pro tio, ke ĝi vidas ĉirkaŭ si tiom multe da altrangaj personoj!”

”Najtingaleto!” ekkriis la kuireja knabineto tute laŭte, ”nia plejmoŝta kaj plej favorkora imperiestro deziras, ke vi kantu antaŭ li!”

”Kun la plej granda plezuro!” respondis la najtingalo, kaj ĝi ekkantis tiel, ke estis plej agraba ĝuo ĝin aŭdi.

”Tio sonas tute kiel vitraj sonoriloj!” diris la kortegestro, ”kaj rigardu do la malgrandan gorĝeton, kiel ĝi forte laboras: Estas tre strange, ke ni antaŭe neniam ĝin aŭdis! Ĝi havos grandan sukceson en la kortego!”

”Ĉu mi kantŭ ankoraŭ nun fojon antaŭ la imperiestro?” demandis la najtingalo, kiu pensis, ke antaŭ ĝi estas la imperiestro.

”Mia bonega, ĉarma najtingalo!” diris la kortegestro, ”mi havas la grandan

plezuron komuniki al vi la ordonon, ke vi aperu hodiaŭ vespere al palaca festo, kie vi devas ravi lian imperiestran moŝton per via ĉarmega kantado!”

”La plej bonan efikon ĝi faras en verdajo!” respondis la najtingalo, sed ĝi tamen iris kun ili, kiam ĝi aŭdis, ke la imperiestro tion deziras.

En la palaco ĉio estis en festa parado. La muroj kaj plankoj, kiuj estis el porcelano, brilis en la lumo de multaj miloj da oraj lampoj. La plej belaj floroj, kiuj povis laŭte tinti per sonoriletoj, staris en la koridoroj. Tie estis granda moviĝado, kio kaŭzis grandan trablovan venton, kaj ĉiuj sonoriloj sonoris tiel senĉese, ke oni ne povis kompreni eĉ sian propran vorton.

Meze en la salono, en kiu sidis la imperiestro, estis starigita malgranda ora kolono, sur kiu devis sidi la najtingalo. La tuta kortego tie estis kolektita, kaj la kuireja knabineto ricevis la permeson stari malantaŭ la pordo, ĉar nun estis jam donita al ŝi titolo de efektiva kortega kuiristino. Ĉiuj havis sur si siajn festajn vestojn, kaj ĉiuj rigardadis la malgrandan grizan birdeton, al kiu la imperiestro faradis aprobajn kapmovojn.

La najtingalo kantis tiel ĉarme, ke al la imperiestro aperis larmoj en la okuloj; la larmoj fluis malsupren sur liaj vangoj kaj tiam la najtingalo kantis ankoraŭ pli bele, kaj ĝia kantado iris profunde en la koron. La imperiestro estis tiel ĝoja kaj kontenta, ke li bonvolis decidi, ke la najtingalo portu oran pantoflon ĉirkaŭ la kolo. Sed la najtingalo dankis, dirante, ke ĝi ricevis jam sufiĉan rekompencan.

”Mi vidis larmojn en la okuloj de la imperiestro, tio estas por mi la plej gran-

da trezoro! La larmoj de imperiestro havas mirindan potencon! Dio scias, ke mi estas sufiĉe rekompencita!”

Kaj tiam ĝi denove ekkantis per sia dolĉa, ensorĉanta voĉo.

”Ĉi tio estas la plej eleganta maniero, por akiri al si favoron,” diris la sinjorinoj ĉirkaŭe, kaj ilis prenis akvon en la buŝon, por doni al sia voĉo ploretan nuancon, kiam iu ekparolos kun ili. Kaj tiam ili pensis, ke ili ankaŭ estas najtingaloj. Eĉ la servistoj kaj servistinoj esprimis sian plej altan kontentecon, kaj tio ĉi tre multe signifas, ĉar ĝuste ili havas ĉiam la plej grandajn postulojn. Jes, la najtingalo havis efektive grandan feliĉon.

Estis decidite, ke ĝi restu nun en la kortego, havu sina propran kaĝon kaj ĝuu li liberecon dufoje en la tago kaj unu fojon en la nokto fari promenon en la libera aero. Dekdu servistoj devis ĝin akompanadi, kaj ili ĉiuj devis ĝin teni per rubando, ligita ĉirkaŭ unu el ĝiaj piedetoj. Certe ne estis granda plezuro en tiaj promenadoj.

La tuta urbo parolis nur pri la mirinda birdo; kaj se du personoj sin renkontis, ili ĝemis kaj faris tiajn ekstazajn mienojn, kvazaŭ ili estus en ne tute normala stato. Eĉ dekunu infanoj de butikistinoj estis baptitaj per ĝia nomo, kvankam iliaj voĉaj organoj tute ne montris ian grandan antaŭkapablon por la kantarto.

Unu tagon oni alportis al la imperiestro grandan keston, sur kiu estis skribite: ”Najtingalo!”

”Jen ni havas novan libron pri nia fama birdo!” diris la imperiestro.

Sed ĝi ne estis libro, ĝi estis malgranda artaĵa objekto, kiu kuŝis en skatolo, artefarita najtingalo, kiu estis kvazaŭ simila al la viva, sed ĉe ĉiuj flankoj estis garnita per diamantoj, rubenoj kaj safiroj. Se oni streĉtordis la artefaritan birdon, ĝi povis kanti unu el la pecoj, kiujn kantis la efektiva najtingalo, kaj samtempe ĝi movadis la voston supren kaj malsupren kaj brilis de arĝento kaj oro. Ĉirkaŭ la kolo ĝi portis rubandeton sur kiu estis skribite: "La najtingalo de la imperiestro de Japanujo estas senvalora en komparo kun la najtingalo de la imperiestro de Ĥinuĵo!" "Belege!" ili ĉiuj diris, kaj tiu, kiu alportis la artefaritan birdon, ricevis tuj la titolon de la imperiestra ĉefa kortega alportisto de najtingaloj.

"Nun ili kantu kune! Kia belega dueto ĝi estos!"

Kaj ili devis kanti kune; sed la afero ne volis iri bone, ĉar la efektiva najtingalo kantis laŭ sia maniero, kaj la artefarita birdo kantis laŭ la rulcilindroj.

"Ĉi tiu ne estas kulpa!" diris la muzikaĵisto, "ĉi tiu severe observas la takton kaj estas tute el mia lernejo!"

Nun oni ordonis, ke la artefarita birdo kantu sole. Ĝi havis tiel same grandan sukceson, kiel la efektiva najtingalo, kaj al tio ĝi havis multe pli belan eksteriĝon: ĝi brilis, kiel braceletoj kaj brustaj pingloj.

Tridek-tri fojojn ĝi kantis tiun saman pecon kaj tamen ne laciĝis. La homoj volonte ĝin aŭdis denove de la komenco, sed la imperiestro esprimis la opinion,

ke nun ankaŭ la viva najtingalo devas ion aŭdigi. Sed kie ĝi estis? Neniu rimarkis, ke ĝi elflugis tra la nefermita fenestro for al siaj verdaj arbaroj.

"Sed kio ĝi estas?" ekkriis la imperiestro; kaj ĉiuj korteganoj insultis kaj diris, ke la najtingalo estas terure sendanka besto. "La pli bonan birdon ni tamen havas!" ili diris konsolante sin, kaj tial la artefarita birdo devis denove kanti, kaj la tridek-kvaran fojon esti antaŭludita al ili la sama peco, sed ili ĉiam ankoraŭ ne konis ĝin perfekte ĉar ĝi estis tro malfacila. La muzikaĵisto laŭdatis la birdon super ĉiuj mezuroj, li eĉ certigadis, ke ĝi estas pli bona ol la efektiva najtingalo ne sole pro la vestoj kaj la multaj brilantaj demantoj, sed ankaŭ rilate sian internaĵon.

"Ĉar vidu, miaj sinjoroj, kaj antaŭ ĉio via imperiestra moŝto, ĉe la efektiva najtingalo oni neniam povas antaŭkalkuli, kio venos, sed ĉe la artefarita birdo ĉio estas difinita: ĝi estos tiel kaj ne alie. Oni povas fari kalkulojn pri ĝi, oni, povas ĝin malfermi, oni povas montri la homan prikalkulon, montri, kiel kuŝas la rulcilindroj, kiel ili iras kaj kiel unu faro sekvas el alia..."

"Tio estas tute miaj pensoj!" diris ĉiuj, kaj la muzikaĵisto ricevis la permeson montri la birdon en la plej proksima dimanĉo al la popolo.

"Ili ankaŭ aŭdu ĝian kantadon!" diris la imperiestro; kaj ili ĝin aŭdis kaj fariĝis tiel gajaj, kvazaŭ ili ebriiĝus per teo, ĉar tio estas tute ĥina maniero. "Ho!" ili diris, kaj laŭ sia moro ili levis unu fingron supren kaj balancis la kapon. Sed la

malriĉaj fiŝkapistoj, kiuj aŭdis la veran najtingalon, diris: "Estas vero, ke tio ĉi sonas tute bele, oni ne povas eĉ nei, ke ekzistas kelka simileco de la melodio, sed io mankas, io, kion mi nur ne scias ĝuste esprimi!"

La efektiva najtingalo estis ekzilita el la lando kaj regno.

La artefarita birdo havis sian lokon sur silka kuseno, senpere apud la lito de la imperiestro. Ĉiuj donacoj, kiujn ĝi ricevis oro kaj juveloj, kuŝis ĉirkaŭ ĝi, kaj pri la titolo ĝi jam atingis la altecon de grandimperiestra noktotabla kantisto kun la rango de konsilisto de la unua klaso de la maldekstra flanko. Ĉar la imperiestro rigardis kiel plej eminentan tiun flankon, sur kiu troviĝas la koro, kaj la koro eĉ ĉe imperiestro troviĝas sur la maldekstra flanko. Sed la muzikaĵisto verkis dudek-kvin dikajn volumojn pri la artefarita birdo. Tiu ĉi verko estis tiel instruiteca kaj tiel longa, tiel plena de la plej malfacilaj ĥinaj vortoj, ke ĉiuj homoj certigis, ke ili ĝin legis kaj komprenis, ĉar alie oni ja rigardus ilin kiel malsaĝajn, kaj oni piedpremus al ili la ventrojn.

Tiel la aferoj iris en la daŭro de tuta jaro. La imperiestro, la kortego kaj ĉiuj aliaj Ĥinoj sciis ĉiun sonon de la artefarita birdo parkere, sed ĝuste tial ili plej alte ĝin ŝatis. Ili povis mem kunkanti, kaj ili tion faris. La strataj buboj kantadis: "cicici! klukluklu!" kaj la imperiestro ankaŭ tion kantadis. Ho, estis ĉarmege!

Sed unu vesperon, kiam la artefarita birdo ĝuste kantis plej bone kaj la impe-

riestro kuŝis en la lito kaj aŭskultis, el la interno de la birdo aŭdigis: "ŝŝŝup!" Io krevis: "ŝurrr!" Ĉiuj radoj ekkuris, kaj baldaŭ la muziko silentiĝis.

La imperiestro tuj elsaltis el la lito kaj sendis voki lian konstantan kuraciston; sed kion tiu povis helpi? Poste oni iris voki la horloĝiston. kaj post longa demandado kaj esplorado li almenaŭ iom riparigis la birdon, sed li deklaris, ke ĝi devas esti tre ŝparata, ĉar la pivotoj estas eluzitaj kaj estas ne eble enmeti novajn tiamaniere, ke la muziko iru kun certeco. Kia granda malĝojo nun estis! Nur unu fojon en jaro oni povis lasi kanti la birdon, kaj eĉ estis granda risko. Sed la muzikaĵisto havis malgrandan paroladon kaj certigis, ke ĝi estas ankoraŭ tiel bona, kiel antaŭe, kaj tiam ĉio estis tiel bona, kiel antaŭe.

Pasis kvin jaroj. Subite la tuta lando ricevis efektivan kaŭzon por granda malĝojo. Ĉiuj alte ŝatis sian imperiestron, kaj nun li estis malsana, kaj oni diris, ke li ne povas plu vivi. Nova imperiestro estis jam antaŭpreparate elektita, kaj la popolo staris ekstere sur la strato kaj demandadis la kortegestron, kia estas la stato de la landestro.

"P!" li respondadis kaj balancadis la kapon.

Malvarma kaj pala kuŝis la imperiestro en sia granda belega lito; la tuta kortego rigardis lin kiel jam mortintan, kaj ĉiu kuris montri sian respekton al la nova imperiestro; la palacaj servistoj elkuris, por babili pri tio, kaj la palacaj servistinoj havis multe da gastoj. En ĉiuj salonoj kaj koridoroj estis sternitaj drapaj kovraĵoj, por ke oni ne aŭdŭ la paŝojn, kaj tial ĉie estis tiel silente, tiel

silente. Sed la imperiestro ankoraŭ ne mortis. Rigida kaj pala li kuŝis en la belega lito kun la longaj veluraj kurtenoj kaj la pezaj oraj penikoj. Alte supre unu fenestro estis malfermita, kaj la luno lumis sur la imperiestron kaj la artefaritan birdon.

La malfeliĉa imperiestro apenaŭ povis spiri; estis al li kvazaŭ io kuŝus sur lia brusto. Li malfermis la okulojn, kaj tiam li vidis, ke tio, kio sidis sur lia brusto, estas la morto. Ĝi metis sur sin lian oran kronon kaj tenis en unu mano la oran glavon de la imperiestro kaj en la dua mano lian belegan standardon. El la faldoj de la grandaj veluraj kurtenoj ĉirkaŭe rigardis strangaj kapoj, el kiuj kelkaj estis tre malbelaj, aliaj estis pacplenaj kaj mildaj. Tio estis ĉiuj malbonaj kaj bonaj faroj de la imperiestro, kiuj nun, kiam la morto sidis sur lia koro, staris antaŭ liaj okuloj. "Ĉu vi memoras ĉi tion?" murmuretis unu post alia. "Ĉu vi memoras ĉi tion?" Kaj ili rakontis al li tiom multe, ke la ŝvito, fluis de lia frunto.

"Tion mi neniam sciis," ĝemis la imperiestro. "Vi, ĉarma ora birdeto, kantu do kantu! Mi donis al vi oron kaj juvelojn, mi eĉ pendigis ĉirkaŭ via kolo mian oran pantoflon, kantu do, kantu!"

Sed la birdo silentis, ĉar estis neniu, por ĝin streĉtordi, kaj sen tio ĝi ne kantis. Sed la morto daŭrigis rigardi lin per siaj grandaj malplenaj okulkavoj, kaj ĉirkaŭe estis tiel silente, tiel terure silente.

Sed jen subite, ĝuste apud la fenestro, eksonis plej bela kantado. Ĝi venis de la malgranda viva najtingalo, kiu sidis ekstere sur branĉo. Ĝi aŭdis pri la mizero de sia imperiestro, kaj tial ĝi venis por

kanti al konsolon kaj esperon. Kaj dum ĝi kantis, la fantomoj pli kaj pli paliĝis, ĉiam pli rapide pulsitis la sango en la malforta korpo de la imperiestro, kaj eĉ la morto mem aŭskultis kaj diris:

"Daŭrigu, najtingaleto, daŭrigu!"

"Jes, se vi donos al mi la belegan oran glavon, se vi donos al mi la riĉan standardon kaj la kronon de la imperiestro!"

Kaj la morto donis ĉiujn multekostaĵojn, po unu por ĉiu kanto kaj la najtingalo estis senlaca en sia kantado. Ĝi kantis pri la silenta tombejo, kie kreskas la blankaj rozoj, kie odoras la siringo, kaj kie la freŝa herbo estas malsekigata de la larmoj de la postvivantoj. Tiam la morto eksopiris pri sia ĝardeno, kaj kiel malvarma blanka nebulo ĝi elflugis tra la fenestro.

"Mi dankas, mi dankas!" diris la imperiestro; "vi ĉiela birdeto, mi bone vin konas! Vin mi ekzilis el mia lando kaj regno, kaj tamen vi forkantis de mia lito la malbonojn, vi forpulis la morton de mia koro! Kiel mi povas vin rekompenĉi?"

"Vi min rekompenĉis!" diris la najtingalo; "larmojn elverŝis viaj okuloj, kiam mi la unuan fojon kantis antaŭ vi; tion mi neniam forgesos al vi, tio estas la juveloj, kiuj estas agrablaj al la koro de kantanto. Sed dormu nun, fariĝu freŝa kaj sana! Mi kantos kaj endormigos vin."

Ĝi kantis; kaj la imperiestro dolĉe endormigis; kvieta kaj bonfara estis la dormo.

La radioj de la suno tra la fenestro falis sur lin, kiam li, refortigita kaj sana, vekigis. Ankoraŭ neniu el liaj servistoj revenis, ĉar ili pensis, ke li jam ne vivas,

sed la najtingalo ankoraŭ tie sidis kaj kantis.

”Por ĉiam vi devas resti ĉe mi!” diris la imperiestro; ”vi kantos nur tiam, kiam vi volos, kaj la artefaritan birdon mi disbatos je mil pecoj.”

”Ne faru ĉi tion!” diris la najtingalo; ”la bonon, kiun ĝi povis fari, ĝi ja faris; konservu ĝin, kiel antaŭe! Mi ne povas loĝi en kastelo, sed permesu al mi venadi, kiam mi mem havos la deziron. Tiam mi vespere sidos tie sur la branĉo apud la fenestro, kaj mi kantos al vi, por ke vi fariĝu gaja, sed samtempe ankaŭ meditema. Mi kantos pri la feliĉuloj kaj pri tiuj, kiuj suferas; mi kantos pri la bono kaj malbono kiu estas kaŝata antaŭ vi. La malgranda birdeto flugas malproksime, al la malriĉa fiŝkaptisto, al la tegmento de la kampulo, al ĉiu, kiu estas malproksima de vi kaj de via kortego. Vian koron mi amas pli ol vian kronon, kaj tamen la krono havas en si ion de laodoro de sankteco. Mi venados, mi kantados al vi! Sed unu aferon vi devas promesi al mi!”

”Ĉion!” diris la imperiestro, kaj li staris en siaj imperiestraj vestoj, kiujn li mem surmetis sur sin, kaj la glavon, kiu estis peza de oro, li almetis al sia koro.

”Pri unu afero mi vin petas! Rakontu al neni, ke vi havas birdeton, kiu ĉion diras al vi, tiam ĉio iros ankoraŭ pli bone!”

Kaj la najtingalo florflugis.

La servistoj envenis, por rigardi la mortintan imperiestron... Surprizite ili haltis, kaj imperiestro diris al ili.

”Bonan tagon!”

Traduko de L. L. Zamenhof

NIA FORUMO

Komuna librolisto kaj katalogo de la sveda literaturo en Esperanto.

Estas ĝenerala plendo, ke ne nove eldonitaj libroj, kiujn oni volonte aĉetus, estas tre malfacile atingeblaj. Ofte okazas, ke libro, pri kiu iu el la centraj vendorganizoj asertas, ke ĝi ne plu estas aĉetebla, estas akirebla ĉe alia organizo. (Persona sperto!) Ĵus mortinta, juna kaj fervora esperantisto Bengt-Erik Jernberg proponis en letero kelkajn semajnojn antaŭ la morto al la redaktoro, ke ĉiuj eldonejoj kaj centraj distribuejoj de la Esperanto-literaturo eldonu *komunan libroliston* (kun speciala atento pri tiuj libroj, kies aŭtoro, temo, malofteco, aŭ aliaj cirkonstancoj motivas la interesigon de la librokolektantoj.)

La ideo meritas la atenton de iu komerca aŭ kultura entrepreno en nia movado.

En la sama letero troviĝas ankaŭ demando, kiun ni tuj transigas al nia legantaro:

Ĉu vi konas unu, du kapablulojn por iniciati kaj gvidi la laboron pri katalogo de sveda literaturo en Esperanto? La laboro eble estas ampleksa, sed... ĉiukaze ne ŝajnas esti tro malfacila. Necesas tradraŝi svedajn eldonaĵojn a) librajn b) revuojn aperintajn en Svedlando kaj nesvedajn c) antologiajn d) kulturrevuojn. La skribinto opinias, ke la laboro ne postulos tro rafinitan metodikon, sed kelkcenton da laborhoroj (kaj antaŭ ĉio bonajn bibliotekajn eblojn).

Kaj laŭ la fino de la karto: Espereble ĉi greneroj radikigos en via menso kaj portos por ĉiu peno po mil grenerojn...

Domaĝe, ke nia talenta kunbatalanto ne plu povas mem akceli la realigon de tiuj valoraj pensoj.

HISPANA ABSTINO

*Iam inter la hispanoj
sidis mi agrable
diskutante kun rondanoj
vinospecojn table.*

*Unu diris: "Se rilatas
vin kaj la abstinon,
kion vi prefere ŝatas
akvon aŭ la vinon?"*

*De alia tre medite
venis la respondo:
"Kiam akvo altkvalite
ŝprucas el la monto,*

*tre malvarma, tute pura
kaj kristale klara,
en kaskado senmezura
kiel Niagara;*

*kiam ŝaŭme ĝi torentas,
pikas la inklinon,
tiam — se soif' potencas —
mi elektas — vinon!"*

(El la "Rozoj kaj Urtikoj")

NABAB'* MI ESTAS

I.

*Vivigan varmon klorofil' kolektas.
En birdbabilo, peoniodoro
la formikaro grave arkitektas,
dum vespoj ŝvingas sin en blinda am-adoro.
Kabano gaja krizneglekte fumas,
herbkreskon pelas verva vivgalopo.
Infana gajo en sereno lumas:
vitraro bunta en kalejdoskopo.
Mi vidas ĉion en kalejdoskopo;
la tuta vivo laŭ koloroj ŝancas.
Sin kasas nigro en la vigla trupo,
kolor' kaj varmo venke aliancas.
De ni dependas ĉion nove ŝanĝi,
dum vivo longa gardi ĝojŝorĉilon,
jam tedajn erojn gaje rearanĝi;
de l' okulparo: doni daŭran brilon.
Nabab' mi estas en la viv' avara.
Animo mia: sorĉa teleskopo,
la vivo arabeskas en la klara,
krediga, bunta korkalejdoskopo.*

* * *

Jen ĉio estas en kalejdoskopo:

II.

*Memoro, festo, rideto juna,
venteto, varmo, muziko suna,
kareso, floro, jen dolĉa timo,
atendo, ploro kaj plaŭda rimo.
Aŭtuno, pluvo, angor-amaro,
plezura tento, volupt', arbaro,
nun fratsopiro, suspir', planforĝo,
mallumo, sorĉo, pasio, torĉo.
Kristala nokto, kometo-helo,
veturo vasta per vigla velo,
oferovolo kaj sindediĉo.
Mond-dron', fiasko, mondoleviĝo.
Inundo, honto ektriumfonta,
ekkrio veka de kompreno punta,
deziro saĝi, kuraĝi, agi,
de lando al lando senlime vagi.
Aŭroro, ardo, mondkarnavalo,
apoteozo, sopir', finalo.
Sort-rulo, lulo, flamlangoj, bruloj,
okuloj...*

*) Nababo ekzotika, lukse vivanta riĉegulo.

DIVERS-ARKIVO

Papero, papero!

UNESKO-raporto informas la mondon, ke nuntempe la gazerpapera konsumo atingas 10 milionojn da tunoj. Ĉirkaŭ 1965 tiu ĉi nombro altiĝos je 15 milionoj.

Grava ekspozicio de Unesko

UNESKO havas aktuale kvar migrantajn ekspoziciojn en la mondo. Ĝis nun 1,2 miloj da homoj en 26 landoj vidis ilin. Unu, konsiderinde grava tia ekspozicio funkcias en Hindio. La temo de la ekspozicio estas la homaj sensiloj kaj iliaj funkcioj. Miloj da homoj vidis guton da akvo el iu hinda rivero sub mikroskopo kaj per tio oni ekhavis intereson pri la higieno kaj pureco. Kion la averto de la kuracistoj ne povis atingi, pri tio guto da akvo sub mikroskopo plentrafe atentigas. Oni notis, ke la intereso estis tiel granda pri tiu ĉi ekspozicio, ke kelkloke ĉiuhore po 1000 homoj vizitis ĝin.

KIO NOVA?

Internacia fervojista kongreso

8—13-a de majo, 1955 en Zürich. Adreso: Poŝtfako 2311 Zürich 23 (Svislando). La plej granda faka kongreso, uzanta Esperanton. Ĉiu esperantisto estas invitata. Riĉa programo.

40-a Universala Kongreso de Esperanto en Bolonjo

Kongreskotizoj post la 31/3, 1955: 38:25 sv. kr. (por unu el ambaŭ partoprenantaj geedzoj: 19:15, gejunuloj ĝis 20 j. 12:75). I. a. estos prezentata "La Revizoro" (Gogol) en la zamenhofa traduko. Ĝis la 31/1: 900 anoncis sin.

28-a SAT-kongreso en Linz

Kongreskotizoj: Por SAT-anoj 2 1/2 dolaroj, geedzoj 4, gejunuloj 1 1/2, gastoj 3 dolaroj. Ĝis la fino de aprilo 20 % rabato. Okazos i. a. Laborista Universitato.

Scienca kaj teknika terminaro

aperos. Aŭtoroj R. Haferkorn kaj d-ro K. Dellian, sub la kontrolo de prof. F. J. Belinfante. — La enhavo estas ordigita laŭ alfabeto kun Esp. difino kaj laŭ la neceso kun germana, angla, franca tradukoj. La terminaro kun 5100 terminoj aperos bindita. Por realigi la verkon oni bezonas antaŭmendojn. La prezo estos 3 dolaroj.

Mendu la verkon jam nun ĉe Dipl. inĝ. R. Haferkorn, Königsseer Strasse 50/0 (13 b) Berchtesgaden, Germ.

LA RESPUBLIKO FARIĜOS POPOLO

Konstitucia asembleo

La komencdato de la Konsitucia Asembleo, dum kiu oni proklamos la Mondcivitanan Respublikon sendependa mondpopolo, estas provizore fiksita en la malfrua somero de 1956. en unu el la landoj de Eŭropo, kaj oni anoncos detalojn kiel eble plej baldaŭ. La proponita Politika Konstitucio, ricevos finan diskuton ĉe la Tria Generale Asembleo en septembro de 1955. La Sekretariaro fidus, ke, adoptinte la Konstitucion, la Respubliko ricevos agnoskon de sufiĉa nombro de naciaj registaroj por ebligi, ke ĝi funkciu kiel nepartia popolo, kiu servas al la tuta homaro.

Generala sekretario

La Sekretariaro de la Mondrespubliko nomis Richard J. D. G. Blackmore tut-

Mánuel Firmo (Angola)

AFRIKA AKVARELO

Kuŝante sur la kanapo en la verando kun duonfermitaj okuloj mi revas pri pasintaj travivaĵoj ekster — kaj enlande.

Absoluta silento min ĉirkaŭas, kiun de tempo al tempo interrompas la susurado de la miljara arbaro ĉiuflanka.

Meze de ĉi tiu altebenajo, loĝata de blankuloj nur de 35 jaroj, malproksime de la t. n. civilizacio, mi jam pasigis 5 sinsekvajn jarojn, mi flustras al mi mem iom melankolie.

”La cafardo” subite komencas sian subfosan atakon. Sed ĉar mi tute ne volas kaptigi min, per decida mantuŝo sur la regulilojn de la radioaparato mi eniras la alian mondon. Benjamin Gigli, la fama itala kantisto regalias per sia melodia voĉo.

Subite en la malproksima ĝangalo la tam-tamo vekas la arbaron. Sovaĝaj krioj

de nigruloj aŭdigas, ŝajne por kontraŭstari la Gigli-an muzikon.

Estas sabate. Kiel kutime, la tam-tamo invitas la loĝantaron de la ĝangalo al la kutima, iom freneza danco ĝis la sunleviĝo.

Tam-tam... tam-tam... tam-tam... jen la primitiva voko de la ĝangalo, sonanta tra la tropika nokto por freneza, neniam en Eŭropo videbla danco.

Genigruloj alkuras de ĉiu flanko, antaŭen puŝitaj de tiu ĉi, por ili magia sono. Mi eksaltas, prenas la elektran lampon kaj eniras la arbaron por ĝui tiun ĉi spektaklon.

Nigruloj kaj inoj, sen interrompo dum horoj dancadas kaj kriadas plengorĝe ĝis la plena ebriiĝo de la sensoj. Sajne ili aŭdas nur la monotonon... Tam-tam!... Tam-tam!... kiu iom post iom subpre-

tempe funkcianta Generala Sekretario. Li estis i. a. dum iom da tempo funkcianta Reprezentanto de la Unuiĝintaj Nacioj en Jordanio.

Fonda fonduso

Oni taksas, ke almenaŭ (25.000 dolaroj) estos bezonataj por plenumi tra la mondo la aranĝojn por la Konstitucia Asembleo. Oni do starigis Fondan Fonduson. Oni atendas, ke ne nur Civitanoj de la Respubliko, sed ankaŭ simpatiantoj kontribuos al la afero. Petu klarigan broŝuron ĉe la Fako de Informado, 27, Red Lion Street, Londono, W. C. I.

St. Urban

LUSTRO KAJ ĈIFONO

STEPHAN URBAN estas ĉeĥa verkisto kaj muzikisto. Liaj originalaj noveloj plurfoje estis inter la premiitaj.

*Glore brilis
en salono
granda lustro
ĉe plafono.*

*Sen mi brilus
nur duono!
prave diris
la — ĉifono.*

mas ĉion. La danco iĝis pli kaj pli erotika, ne el fizika, sed el arta vidpunkto, oni povas aserti. Ĉiuj membroj de la ŝvitantaj gedancistoj, brilantaj ebone, moviĝas volupte laŭ la lumo de la fajro, zorge nutrata.

Eĉ la spiralanta serpento ne movas sin tiel bele, kiel la nigraj, ebonaj korpoj.

Kompare al la dancoj, prezentitaj en admirindaj filmoj tiuj de la nigruloj havas nesupereblan avantaĝon. En filmo ĉio estas zorge preparita en salonoj, kie ne mankas luksaj, orientaj tapiŝoj, multkoloraj vualoj, silkaj kusenoj kaj koloritaj lampoj por vivigi la scenejon.

Male, ĉi tie, ĉio estas natura, ĉio okazas en primitiva medio, meze de la arbaro, loĝata ankaŭ de sovaĝaj bestoj, sub firmamento brodita de sennombraj tremantaj steloj, kiuj pale lumigas la scenejon.

La lumo de la fajro strange respegulas la korpojn de la dancistoj tra la miljara arbaro. Ĉirkaŭe misteraj, nemezureble gigantaj ombroj agitas freneze ĉiudirekten. Oni dirus, ke ankaŭ la arboj dancas, puŝataj de la sono: tam-tam... tam-tam... tam-tam... .

Kiam mi sentas min preta, nerezisteble preta por salti mezen de la rondo de ebonaj ŝvitperlitaj korpoj, malfacile mi bremsas tiun ĉi strangan deziron, kaj revenas hejmen.

Multfoje mi vekigis nokte. Mi reekdormas kaj revekiĝas kaj aŭdas la ĉiaman sonon tam-tam... tam-tam... tam-tam... tra la varma nokto, miksite kun la susurado de la sangoavidaj kuloj, kiuj rondflugas mian kul-vualon, serĉante eniron por nokta bankedo.

Nur kiam je kelkkilometra distanco

ĈINAJ PARABOLOJ

Trad. Venlo Fon

Tio ne koncernas min.

Estis viro, kiu malsanis je piedabsceso neelporteble dolora.

"Traboru la muron por mi," li diris al la servisto.

Kiam la truo estis farita, li etendis la piedon tra ĝi en la ĉambron de la najbaro.

"Kion vi faras tie?" demandis la servisto.

"Ĝi doloru en najbara domo! Tio ne koncernas min!"

Kirurgio.

Estis kirurgo, kiu fanfaronis, ke li bone scias kirurgion. Kolonelo, trafita de sago eniĝinta profunde en la ventron, revenis de batalkampo kaj lin venigis por kuracado. Li detondis la finon de la sago per bona tondilo kaj petis honorarion.

"La parto de la sago en la ventro bezonegas operacion!"

"Tio estas interna kuracado. Strange, ke vi tion trudas al mi, kirurgo!"

(El Literatura Mondo. 1937)

leono aŭdigas sian akrotonan voĉon, fariĝas tuja mirakla silento. Eĉ la arbfolioj, la insektoj, la vento, la tam-tamo, ĉio kvietiĝas milde, obee al tiu ĉiopova timiga reĝo de la arbaro... Malvarma, terura malvarmo enpenetras mian korpon kaj min skuas kiel marioneton...

ALVOKO AL LA JUNULARO

“Nia laborista esperanto-junularo devas vekigi kaj ekagi serioze por kiel eble plej efike utiligi la bonŝancon, kiun prezentas por nia afero la hodiaŭa haoso kaj internacia malkompreno en la mondo.”

Ernst Eriksson

Estas nediskutebla fakto, ke en nia movado mankas junaj fortoj, kiuj kun celkonscia laboro portas antaŭen la verdan standardon inter la laboristaro. Nia enlanda esperantistaro plejparte konsistas el plenkreskaj gekamaradoj, kiuj dum multaj jaroj fidele batalis por nia afero. Ili estas tiuj, kiuj ankaŭ hodiaŭ faras sian plejebulon por konservi kaj kreskigi la movadon. Ofte ili restas aktivaj ĝis la plej alta jaraĝo, ĝis la lasta tago de sia vivo.

Ni, laboristaj gejunuloj devas konscii pri tio, ke foje alvenos la tempo, kiam pli aĝaj kamaradoj iom post iom falos el niaj vicoj. Kio okazos, se ni kontinuas same inertaj kaj lasas ĉiun laboron al niaj veteranoj, eĉ pioniroj? Kio okazos, se la movado ne havos sufiĉe de junaj lertuloj, kapablaj konduki nian lingvon al la venko inter niaj samklasanoj? Ni devas nepre konscii ankaŭ pri tio, de nia generacio havas la plej favoran eblon por akceligi la ĝeneralan enkondukon de esperanto en la internacian vivon de la popoloj. Ni ne rajtas neglekti tiun gravan rolon, kiun nia epoko destinas al ni por la bono de ni mem kaj tio de la venontaj generacioj. Ni ne rajtas serĉi pretekstojn kaj retiri nin de sinofera laboro, kiam la realigo de tiu idealo postulas nian helpon.

Kio estas do nia tasko por ĝusta agado?

Unue ni devas ĉerpi forton de la ekzemplo, kiun donas al ni niaj bravaj gvidantoj, sperti de ilia vivo kaj imiti iliajn agojn. Ni ellernu perfekte la lingvon, klopodu uzi ĝin ĉie kaj ĉiam. Ni interesiĝu pri niaj organizoj, niaj literaturo, kongresoj kaj ĉiuj kulturaj eventoj.

Due ni devas organizi nin por povi reciproke koni unu la alian, koncentrigi nian forton, helpi por kune venki la obstaklojn sukcese povi realigi nian laboron.

Trie ni devas ellabori sisteman laborplanon por la kiel eble plej larĝa disvastigo de esperanto inter la diversaj tavoloj de la sveda laborista junularo. Ni devas penetri en ĉiujn junularajn organizojn, kiuj havas membrojn inter 18—35 jaroj. En ĉiuj lokoj, kie troviĝas almenaŭ unu junulo aŭ junulino, kapabla gvidi kurson en esperanto, li aŭ ŝi bezonas persone persvadi la estraron de la junularaj organizoj por delegi reprezentanton parte de sia klubo al centra esperanto-kurso, organizota de nia juna kamaradino. Ĉiuj kluboj nur unu aŭ maksimume du membrojn, kiuj dum la unua jaro ellernos esperanton kaj akironte kursgvidan kapablon ili mem aranĝu kursojn en siaj propraj organizaĵoj. Tiu ĉi senpera forma de propaganda kaj organiza laboro havas multe da gravaj detaloj, kiuj ne povas esti neglektotaj dum la aplikado por

ROBERT BURNS

JEPPE AAKJAER (1866—1930) dano. Robert Burns, la fama skota poeto forte influis lin. Profunda solidaro kun la malriĉuloj kaj sincera indigno pro la maljusto karakterizas lian verkadon, ofte tragedian, ofte tamen suke humoran.

*Ĉe riveret' en skota land'
al olda kverk' vi ligis la ĉevalon.
Vi spiris kantojn, ĉiu diamant'
supera la Stjuartan kron-opalon.*

*Malriĉe lasis morti en mizer'
popolo skota sian filon grandan.
Malfruis tro rekono post sufer'
statuoj donas nun honoron vantan.*

*Ĉar ĉiam sama la martira sort'!
Vivanta: ŝtonajn batojn kaj obstaklojn.
Sed kiam palas manoj en la mort':
per l' ostoj oni faras jam miraklojn.*

El la dana: Poul Thorsen.

(El la ĵus aperinta "Rozoj kaj Urtikoj")

atingi la plej certan kaj nepran sukceson. Tial ni devas bone antaŭlabori ĉion, interŝanĝi opiniojn kaj konsilojn.

Ĉu vi rekonas la absolutan neceson de serioza agado inter la junularo por krei amase novajn esperantistojn en nia lando? Ĉu vi emas kunhelpi kun ĉiuj viaj kapablo kaj talento en la realigo de tiu ĉi grava aktiveco? Ĉu vi volas eluzi la okazon por fari vian plejblon por la

atingo de la fina venko de esperanto en la laborista klaso?

Se vi respondas jese, bonvolu informi nin pri via valora subteno, kiun nia movado danke akceptas.

Ne atendu ĝis morgaŭ, ekskribu jam hodiaŭ viajn nomon kaj adreson kun kelkaj vortoj al SLEA, (Junulara-Organizo) Barnhusgatan 8 n. b. ö. g. Stockholm C.

S. KASSAI

LA PLI FORTA

(Sceno)

AUGUST STRINDBERG (1849—1912). Literatura giganto. Plena de interesoj, forto kaj kontraŭdiroj. Senindulga observanto de si mem kaj de aliaj. Fondinto de freŝa, moderna sveda rakonta stilo. Kiel dramverkisto apartenas al la plej influaj genioj de la mondliteraturo. Krom beletraj verkoj li okupis sin ankaŭ pri kulturhistorio, lingvoscienco, naturscienco.

Personoj: Sinjorino B., aktorino, edzino,
Fraŭlino A., aktorino.

Scenejo: Angulo en kafejo por sinjorinoj,
du etaj fertabloj, ruĝpluŝa sofo
kaj kelke da seĝoj.

(*Sinjorino B.* envenas vestita en vintraĵ
ĉapelo kaj mantelo kun delikata japana
korbo surbrake. *Fraŭlino B.* sidas kun
duone eltrinkita bierbotelo antaŭ si, le-
gante ilustritan gazeton, kiun ŝi poste
metas flanken kaj prenas aliajn.)

B.: Bonan tagon, eta Amelie. Vi sidas
ĉi tie sola dum kristnaska vespero kiel
kompatinda fraŭlo.

A.: (rigardas el la gazeto, kapklinas
jese kaj legas plu.)

B.: Sciu, ke al mi estas vere dolore vidi
vin; sola, sola en kafejo eĉ dum la krist-
naska vespero. Estas dolore, same dolore,
kiel estis, kiam mi vidis en Parizo, en
restoracio geedziĝan gastaron kaj la nova
edzino sidis legante ŝercgazeton, dum la
nova edzo bilardludis kun la geedziĝ-ate-
stantoj. Ho, mi pensis, kun tia komenco
kia daŭrigo kaj fino!

Li bilardludis dum la geedziĝa vespero.

Kaj ŝi legis ŝercgazeton! Nu, tio ne
estas precize la sama.

(*Kelnerino* eniras, metas tason da ĉoko-
lado antaŭ s-inon B. kaj eliras.)

B.: Amelie, ni rezonu! Nun mi opinias,
ke estus pli bone se vi estus konservinta
lin. Ĉu vi memoras, ke mi estis la unua,
kiu diris al vi: pardonu lin! Ĉu vi me-
moras tion? Nun vi povus esti edzino
kaj havus hejmon; ĉu vi memoras la
pasintan kristnaskon, kiel feliĉa vi estis,
tiam vi estis ĉe la gepatroj de via fianĉo
en la kamparo; kiel vi laŭdis la feliĉon
de la hejmo kaj sopiris for de la teatro!
— Jes, kara Amelie, la hejmo estas ja
la plej bona — post la teatro — kaj la
infanetoj, jes, sed tion vi ne komprenas.

A.: (malestima mieno.)

B.: (trinkas kelkajn kulerojn el la taso;
poste malfermas la korbon kaj montras
la kristdonacojn.) Jen, vidu kion mi aĉe-
tis al miaj etaj aĉuloj. (Elprenas pupon.)
Jen tion mi donos al Lisa! Vi vidas, ke
ĝi povas ruli la okulojn kaj turni la ka-
pon! Jes! — Kaj jen estas la korkpisto-
lo por Maja. (Ŝarĝas kaj pafas rekte al f-ino
A.)

A.: (gestas ektime.)

B.: Ĉu vi ektimis? Ĉu vi kredis, ke mi volas vin pafi? Ĉu? — Vere tion mi povus kredi, ke vi pensis tion. Se *vi* volus pafi *min*, mi mirus malpli, ĉar mi malhelpis vin — kaj mi scias, ke vi neniam tion forgesos — kvankam mi estis tute senkulpa. Vi kredas ankoraŭ, ke mi intrigis vin for de la Granda Teatro, sed tion mi ne faris! Mi vere ne faris, kvankam vi kredas. — Jes, ne gravas, ke mi tion diras, ĉar vi kredas, ke mi kulpas. (Montras paron da broditaj pantofloj.) Tiujn ĉi mi donacos al mia ulo. Kun tulipoj, kiujn mi mem brodis — mi malamas tulipojn, sed li volas havi tulipojn sur ĉio.

A.: (kun ironia kaj scivolema mieno rigardas supren el la gazeto.)

B.: (metas po unu mano en la pantoflojn.) Ĉu vi vidas, kiel etaj estas la piedoj de Bob! Jes? Kaj vi devus vidi lian elegantan iron! Vi neniam vidis lin en pantofloj, vi, ĉu ne?

A.: (ridas laŭte.)

B.: Vidu, jen vidu! (Irigas la pantoflojn sur la tablo.)

A.: (ridas laŭte.)

B.: Kaj do, kiam li koleras, jene li frapegas per la piedoj: "Ĉu? La malbenitaj knabinaĉoj neniam lernos kuiru kafon! Ha! Kretenoj, ili nun ne orde tondis la meĉon de la lampo!"



*Indiĝeniĉoj laborantaj. Annette Michele, 12-jara. Leopoldville, Belga Kongo.
El la ekspozicio de SLEA.*

Kaj ni havas planktrablovon kaj liaj piedoj malvarmas: "Hu, kiom malvarme, kaj tiuj ĉi praidiotoj ne kapablas prizorgi la fajron en la ferforno." (Ŝi frotas la pantoflojn per la plando de unu al la supra ledo de la alia.)

A.: (ridegas.)

B.: Post sia alveno hejmen li serĉas siajn pantoflojn, kiujn Maria metis sub la klapkomodon... Ho, ne estas bone sidi ĉi tie kaj tiel ridindigi mian edzeton. Ĉiukaze li estas afabla kaj bona vireto, — vi devus havi tian edzon, vi Amelie. Pro kio vi ridas? Kial! Kial! — Kaj mi ankaŭ scias, vi komprenu, ke li estas fidela al mi; jes, tion mi scias: Ĉar tion li mem rakontis... pro kio vi rikanas? — ke, kiam mi teatrorondis en Norvegujo, tiam vizitis lin la aĉa Frédérique kaj volis lin delogi — ĉu vi povas imagi ion tiel senhontan. (Paŭzo.) Sed mi elskrapus ŝiajn okulojn el la kapo, se ŝi klopodus, kiam mi estas hejme. (Paŭzo.) Feliĉe Bob mem parolis pri tio, ke ĝi ne atingis min ĉe la klaĉovojo. (Paŭzo.) Sed Frédérique ne estis la sola, kredu al mi! Mi ne komprenas, sed virinoj freneze klopodas logi *mian* viron. Eble ili kredas, ke li havas ian influon pri dungoj, al la teatro, ĉar li oficas en la departemento. — Eble ankaŭ vi volis lin iel kapti! — Tro mi ne fidis vin, — sed nun mi scias, ke lin vi interesis, kaj ke vi iom malŝatis lin, tion mi ĉiam suspektis.

(Paŭzo; ili kun ĝeneto rigardas unu la alian.)

B.: Venu al nia hejmo ĉivespere Amelie, kaj montru, ke vi ne koleras nin, almenaŭ ne min! Mi ne scias, kial, sed min tuŝas la sento tre malagrabla, esti precipe *via* malamiko. Eble pro tio, ke

mi iam baris la vojon por vi — (pli malrapide) aŭ — mi tute ne scias — esence kial.

(Paŭzo. A. scivole kaj fikse rigardas s-inon B.)

B.: (penseme.) Estis tiel strange pri nia konateco — kiam mi vin vidis la unuan fojon, mi timis vin, mi ne volis vin ellasi el mia kontrolado, kien ajn mi venis kaj iris, mi ĉiam troviĝis en via proksimo, mi ne kuraĝis esti via malamiko, tial mi iĝis amika al vi. Sed ĉiam regis disharmonio, kiam vi venis al ni, ĉar mi vidis, ke mia edzo ne povas toleri vin — mi sentis ion kvazaŭ oblikvan, kiel tiam, kiam vestoj ne konvenas — kaj mi faris ĉion por ke li montru afablecon al vi, sed sensukcese, ĝis vi fianĉiniĝis. Tiam ekfloris impeta amikeco, tiel ke momente ŝajnis, kvazaŭ de tiam vi kuraĝis montri viajn verajn sentojn, ĉar vi estis en sekureco — kaj poste — kiel estis? Tre strange mi ne estis ĵaluza! Kaj mi memoras la bapton, vi estis baptopatrino, kaj mi instigis lin vin kisi — tion li faris, sed vi tiom embarasiĝis — tio estas: tiam mi ne rimarkis tion, neniam antaŭe mi pensis pri tio — antaŭ ol nun! (Stariĝas abrupte.) Kial vi silentas? Vi ne diris eĉ unu vorton dum la tuta tempo, vi nur lasis min sidi kaj paroli! Vi nur rigardis kaj elbobenigis ĉiujn miajn pensojn, kiuj kuŝis en mi, kiel krudsilko ĉirkaŭ sia kokono — pensoj — eble suspektoj — mi vidu. — Kial vi eksfianĉiniĝis? Kial vi neniam post tio eniris mian hejmon? Kial vi ne volis veni al ni hodiaŭ vespere.

(A. faras mienon, kvazaŭ ŝi intencus paroli.)

B.: Silentu! Vi ne bezonas ion diri, ĉar nun mi mem komprenas ĉion! — Ĉar

estis tial kaj tial kaj tial! — Jes, jes, nun ĉiuj kalkuloj konformas. Tiel devas esti. — Fi, mi ne volas sidi ĉe la sama tablo, kiel vi! (metas siajn aĵojn sur la alian tablon.) Tial mi devis brodi tulipojn, kiujn mi malamas, sur liajn pantoflojn, ĉar vi ŝatas la tulipojn, jes tial — (ĵetas la pantoflojn planken) — ni devis loĝi ĉe la lago Melaren dum la somero, ĉar vi ne ŝatas la maron, tial mia fileto devis havi la nomon Eskil, ĉar tio estis la nomo de via patro; tial mi devas porti viajn kolorojn, legi viajn verkistojn, manĝi viajn frandaĵojn, trinki viajn trinkaĵojn, ekzemple vian ĉokoladon, estis tial — Ho mia Dio, — estas terure, se mi pripensas tion, estas terure! — Ĉio venis de vi al mi, eĉ viaj pasioj! — Via spirito enrampis la mian kiel vermo en pomon, manĝis kaj manĝis, ĝis nur la ŝelo restis kun iom da nigra faruno! Mi volis fuĝi de vi, sed mi ne povis, vi kuŝis kiel serpento kun siaj nigraj okuloj kaj ensorĉis min — mi sentis, kiel la flugiloj leviĝis nur por tiri min malsupren; mi kuŝis en akvo kun kunligitaj piedoj, kaj ju pli streĉe mi klopodis naĝi, des pli mi profundigis, profunden ĝis drono ĉe la fundo, kie vi kuŝis kiel giganta krabo por kapti min en viajn pinĉilojn — kaj nun mi kuŝas tie!

Fi, kiel mi malamas vin, malamas vin, malamas vin! Sed vi, vi nur sidas kaj silentas, trankvila, indiferenta, ĉu estas novluno aŭ ĝia malo, kristnasko aŭ novjaro, ĉu proksimuloj estas feliĉaj aŭ malfeliĉaj; senpovaj malami aŭ ami; senmova kiel cikonio ĉe mustruo — vi mem ne povis ekflari vian viktimon, vi ne povis ĝin persekuti, sed vi povis ĝin finatendadi! Ĉi tie vi sidadas en via angulo — ĉu vi scias, ke ĝin oni nomas laŭ vi ratkaptilo — kaj legadas viajn gazetojn

por vidi, ĉu iu malsukcesas, ĉu iu mizeriĝas, ĉu oni maldungis iun en la teatro; ĉi tie vi sidadas kaj ĝisatendas viajn viktimojn, prikalkulas viajn ŝancojn kiel piloto ŝipopereon, akceptadas viajn tributojn. Kompatinda Amelie! Ĉu vi scias, ke mi tamen kompatas vin, ĉar mi scias, ke vi estas malfeliĉa, malfeliĉa kiel vundito kaj malica pro via vundo! — Mi ne povas koleri vin, kvankam mi volus — ĉar tamen vi estas la malforta — ja, tio rilate al Bob, ne gravas! Ne gravas por mi'. Kaj ĉu vi instruis al ni trinki ĉokoladon aŭ al iu alia, tio povas esti tute indiferenta. (Trinkas kuleron da ĉokolado el la taso. Prudentete.) Krom tio ĉokolado estas tre saniga! Se mi de vi lernis min bele vesti — jes, *tant mieux* (=des pli bone) — tio nur ligis mian edzon eĉ pli forte al mi kaj tie vi perdis, dum mi gajnis — jes, laŭ kelkaj signoj mi kredas, ke vi jam perdis lin! — Sed certe via intenco estis, ke mi cedu, kiel vi faris, kaj kion vi nun pripentas — sed vi sciu, ke tion mi ne faras! — Ni ne estu bagatelemaj! Kaj kial mi nur prenu tion, kion neniu alia deziras! Ĉu ne eblas, kiam mi konsideras la aferon, ke mi estas en la nuna momento vere la pli forta — vi ja neniam ricevis ion de mi, sed vi nur donis el via — kaj nun mi similas al la ŝtelisto — kiam vi vekiĝis, mi posedis tion, kio mankas al vi! Kiel aliel klarigi, ke ĉio estas senvalora, sterila en via mano? Vi ne povis restigi ĉe vi la amon de iu viro per viaj tulipoj kaj pasioj — tion mi povis fari: vi ne povis lerni la arton vivi pere de viaj verkistoj: tion mi lernis; vi ne ricevis etulon Eskil, kvankam via patro havis la nomon Eskil. Kaj kial vi konstante kaj kontinue silentas, silentas, silentas? Jes, vi kredis, ke tio estas potenco, sed eble estas nur, ĉar vi havas

SVEDA POEMARO — GRAVA EVENTO

Sveda Poemaro (tradukoj de *Magda Carlsson*, eld. Eldona Societo, Stockholm, 112 p. Prezo: 6:— kr.) prezentas kristaliĝintan arton de lingva talento, kaj tiun de eleganta interpretisto, zorgema trans-plantanto de svedaj floroj al la humo de la internacia lingvo. La unua aŭtoro, per kies poemoj la libro prezentas sin, estas la granda sveda psalmirikisto, *Johan Olof Wallin* (1779—1839). Post liaj kvar poemoj, tradukitaj kun profunda kunsento de la majestaj originaloj, sekvas 31 aŭtoroj modernaj aŭ klasikaj, entute proks. 70 tradukoj kaj proksimume samnombraj perloj de tradukarto. La klavaro de la artistino estas ampleksa: ŝi tradukas kun same obeema humilo la profundajn suspirojn de la religia poezio, kies incita interpretanto ŝi estas, kiel modernajn poemojn, kies sentprofundon kovras ludema, ŝajne, sed nur ŝajne ciniĝa humoro (kiel ekz. ĉe Nils Ferlin). *Magda Carlsson* — laŭ sia eldiro — ne faris sian kolekton laŭ antaŭe preparita plano, sed laŭ la rezulto ĝi estas proksima al la antologia formo; kun iom da aldono ĝi jam estus antologio.

La leganto trovas specimenojn el la libro, kiuj en si mem certe vekos la atenton kaj la aĉetemon. Ĉi-loke ni nur ripetas parte la enkondukajn vortojn de *F. Szilagyi* pri la verko kaj verkistino:

”Antaŭ ol ŝi tradukas la poemojn, ŝi penetras ĝis ilia kerno. Certe longaj studoj antaŭas la veran laboron. Sed kiam ŝi sentas: ke ŝi estas preta, ŝia arto estas certa, ŝi vivas jam en la poemo, ŝia animo sentas la ritmon de la poema animo, ŝi travivas la tradukotan verkon kaj reverkas ĝin kun suverena arto.”

La libro digne reprezentas la kulturon kaj la animon de la sveda poezio, kaj sekve ĝi estas despli rekomendebla por aĉeto kaj disvastigo ankaŭ en aliaj mondirektoj, ĉar la ekstera apero de la libro estas tre agrabla.

Entute la poemaro ne estas nur gajno el sveda vidpunkto, sed ĝi signifas dignon ankaŭ por la universala kulturo de nia universala lingvo, dank’ al la escepta talento kaj serioza memkritiko de la tradukintino.

nenion por diri! Ĉar vi kapablas pensi pri nenio!

(Stariĝas kaj prenas la pantoflojn de la planko.)

B.: Nun mi iros hejmen — kaj mi kunportos — viajn tulipojn. Vi kapablis lerni nenion de aliuloj, vi ne povis vin klini — kaj tial vi rompiĝis kiel seka kano —

sed ne mi. Mi dankas al vi, *Amelie* pro ĉiuj bonaj instruoj; dankon, ke vi instruis mian edzon ami! — Nun mi iras hejmen lin ami.

(Foriras.)

(Kurteno.)

El la sveda: *Victor Ekström*

FLOROJ EL DANLANDO

Rozoj kaj Urtikoj

Poul Thorsen, la verkinto, parte tradukinto de la bela libro kun la supra titolo, estas jam konata nomo en nia literaturo pro siaj ofte premiitaj poeziaĵoj, studoj, prelegoj kaj bibliografia verko pri la dana literaturo en Esperanto. La verko "*Rozoj kaj Urtikoj*" (eld Komuna Konversacia Klubo, Kopenhago, 117 p. en bela bindo kun bonegaj tipografio kaj vinjetilustraĵoj de B. Hamberg. Prezo: 8:— kr.) konsistas el 66 poemoj, el kiuj iom malpli ol la duono estas originalaj. La redaktado de la traduka parto jam el eksteraj vidpunktoj estas tre bona, kun koncizaj notoj pri la 24 danaj aŭtoroj.

Jam ĉe tradukoj oni estas kaptita de le originala individuo de la poeto. Oni ne povas ekskluzivigi la nomon "poezio" por unu aŭ alia poezia speco, aŭ unudirektita agordaro: "la poezia domo enhavas multajn ĉambrojn," diras William Auld en sia enkonduko. Nu, malgraŭ tio, ke Thorsen donas vastan rigardon al la dana poezio, oni rimarkas laŭ la tradukoj, ke li estas objektiva, intelekta poeto kun eksterordinare granda formsento; sekve la tradukoj tiam atingas la maksimuman kungeniecon, kiam la aŭtoroj eminentas ĝuste per la samaj virtoj (Tom Kristensen, Johannes V. Jensen, Hans Hartvig, Seedorf Pedersen k. a.). Sed, ke tio ne signifas ekzaktan prijuĝon koncerne la tradukarton de Thorsen, tion pruvigas la aliloke prezentita poemo de Jeppe Akjaer: Robert Burns.

"Jen tamen mallonga eldiro: — Mi lernis la lingvon pro miro. — Nur flari mi volis — sed ĝi ekpetolis — kaj kaptis min ĝis plendeliro" — diras Thorsen en sia poemo "Enketo", t. e. versa respondo en enketo, *kial* li ellernis la lingvon. Tiu "plendeliro" pro la vivo kaj vivebligo de la lingvo, pri kiu lasta Thorsen estas majstro, determinas parte ankaŭ la originalan poezion de la libro. La ceteraj determinantoj estas la satiremo, urtika kritiko, kiujn mildigas kelkfoje molaj agordoj de la milda humanismo, kies fonto estas nature la sama forta indigno. Bela ekzemplo estas la "Fenestroj", kies mole melankoliajn bildojn li finas per la jena durtona karakteriza bildo: "Imago... peladas min plu — tra nigra ĝangalo betona." La absolute pli granda parto de la originalaĵoj estas satiroj, epigramecaj poemoj, en kiuj la forma senso pariĝas al nepra kerno: ĉi tie oni ne povas pensi pri sprito pro la sprito mem, sed la senco de tiu ĉi suka, tera- kaj ofte tute verisme odora poezio ne provokas nian ridon aŭ kritikon sen iu pli certe fiksita celo, al kiu la aŭtoro konstante kaj kuraĝe iras.

Ni tute konsentas kun la ekondukaj vortoj de W. Auld: "Gratulinda kaj ŝatinda verko...". Niaflanke — eble persona gusto — ni esperas, renkonti plurajn poemojn ĝuste en la spirito de la menciita "Fenestroj", sed tiu ĉi espero tute ne havas kritikan pikon, male: ŝatan deziron.

F. S.

KONCIZA ENCIKLOPEDIO POR PROPAGANDISTO

D-ro I. Lapenna: La Internacia Lingvo (Eld. U. E. A. Ricksmansworth, 192 p., band. Prezo: 8:— kr.).

Klara, logika divido kaj frapa koncizo karakterizas ankaŭ tiun ĉi verkon, kiel ĝenerale ĉiujn librojn, kiuj aperas kun la nomsigno de d-ro Lapenna. La eldonon de la verko motivas la neceso prezenti la rezultojn de Esperanto koncize, kaj klare kun la deziro "ke ĉiu esperantisto . . . serioze pripensu, kiom da laboro, kiom da energio kaj tempo estis necesaj por krei tiun grandiozan tuthoman konstruaĵon de edukado, kulturaj kaj praktikaj servoj. "Sed, kiel la Enkonduko konstatas, ekzistas ankaŭ alia celo, kaj tio estas transdoni — en sistema ordo — la faktojn pri la stato de niaj lingvo kaj movado al ĉiu, kiu volas esti ĉenero en nia granda informa servo por vekti la maksimuman intereson por nia kulturakcela movado.

La unua ĉapitro okupas sin pri la ekestado kaj evoluo de Esperanto. La tuta ĉapitro estas majstrajo de la vort-ekonomio. Oni ne bezonas aldoni aŭ forpreni ion kaj tiurilate la recenzisto speciale ĝuis la resuman priskribon de la esp. gramatiko. La dua ĉapitro citas eldirojn pri Esperanto. Inter tiuj famuloj, kies eldiroj flatas Esperanton, estas verkistoj, ŝtatistoj, Nobel-premiitoj. Ne troviĝas ĉiuj eldiroj, sed nur kelkaj, pli precize 15. La tria ĉapitro okupas sin pli la instruado de

Esperanto; ĝi donas rapidan momentfoton pri ĝia stato. Ĉe tiu ĉi ĉapitro oni volonte akceptus iom da plilongigo. La ĉapitroj pri la beletra kaj scienca literaturo estas preskaŭ kompletaj, kvankam mankas mencio ekz-e pri "Dekdu Poetoj", pri la originalaj verkoj de Lanti, pri kelkaj verkoj el la artfaka literaturo, aperintaj ĉe Literatura Mondo (ekz-e: Moderna arto k. c.), sed sendube la disponebla spaco grandparte, se tamen ne tute motivis la ellasojn. La ĉapitro: Diversaj formoj de aplikado de Esperanto pritraktas Esp-on en la komerco, turismo, radio poŝto, telefono, telegrafo, sonfilmo, prelegvojaĝoj. Aparta ĉapitro donas informojn pri la Internacia Esperanto Muzeo en Vieno.

La dua parto pritraktas la Esp. organizaĵojn, unuavice inter ili la rolon de UEA.

Eleganta ekstero (kun iom tro dikdorsa bindo) kaj bona tipografio karakterizas tiun ĉi necesan kaj nepre utilan verkon.

F. S.

Salom Alejĥhem: Al ĉiuj egale (Kolekto de la Liona Esperantisto, 28 p. prezo: 2 resp. kup. Novelo, trad, el la jidiŝa lingvo: M. Salzmann).

Kio okazus, se la ekonomia diverseco tute ĉesus inte la homoj, pri tio rakontas en sia bonhumora, suka maniero la konata jidiŝlingva aŭtoro. La traduko estas bona.

VOCO DE INDIGNO

(Novaj libroj el Japanio)

La ĉasteco de Japanio. (El la verkoj de Mizuno Hiroŝi kaj Gotoo Cutomu, 48 p. prezo: 4 resp. kuponoj, eventuale en libroj. Broŝurita. Eld. El Japanio. P. O. Kesto 5, Toyonaka, Japanio).

Komence estis la atombombo, poste la okupo kaj fine la militbazoj. Ĉiuj tri periodoj efike detruas tion, kion la libro nomas la "ĉasteco de Japanio". Virinoj iĝas ofte perfortitaj dum tiaj tempoj kaj la ekscesojn oni skribas sur la kontojn de la amerikaj soldatoj kaj iliaj federitoj, la japanaj publikulinoj, "panpan"-oj, kiuj ja mem plejparte estas viktimoj de la militaj tempoj rekte aŭ nerekte. La objektivecon de la libreto honoras, ke oni konsideras ankaŭ amerikajn soldatojn viktimoj.

Mem la libro realisme priskribas perforton pri virinoj, ilian suferon kaj kelkfoje martiriĝon per tuja, sinofera morto, aliffoje per longdaŭra sufero kaj iompostoma detruigo. La tendenco estas klara: oni deziras forigi ĉiun spuron de lamilito. La Packontrakto ne donis al la japana popolo laŭ la libro, la trankvilon. La militbazoj tenas la landon en konstanta militpreteco kaj la agordo de la milito kun perfortaĵoj ekzistas. La japana moralo kaj la japana kulturo perdas pli kaj pli el siaj plej favoraj rezultoj, ekestas la grava problemo de la "panpan"-oj, kaj oni devas studi, observi la problemon tre serioze. La libro estas ne nur interesa, sed ankaŭ forta.

Ogura — Toyofumi: Kun la Kadavro de l'Edzino (Tred. Aanaki-Sadami. Eld. Japana Esp. Librokooperativo, Nakacuhamadoori 2—20, Oojodo-ku, Osaka, 52 p. Prezo: 120 y. aŭ egalvaloro.)

La originala titolo de la libro estis "Leteroj al Mortinta Edzino". En la nuna formo la libro estas kortuŝe prema koncizigo de la originalo; la aŭtoro estas profesoro de la Universitato en Hiroŝima kaj sur tiuj neforgeseblaj paĝoj li priskribas, kiel li perdis sian edzinon dum aŭgusto en 1945, kiam la unua atombombo eksplodis super la centmiloj de Hiroŝima. Prof. Ogura-Toyofumi ne uzas parafraziojn kaj grandajn vortojn, sed lia priskribo kaj liaj vortoj trafas kaj atingas nin nekontraŭstareble. Oni terurigas kaj vekigas, se oni ankoraŭ ne estas konscia pri la danĝero, kiu minacas nin ĉiujn. Ne estas tiomgrade la priskriboj de la atombombaj teruroj, kiujn la sciencisto notas en raporta tono, sed kun sentebla emocio, sed la grado de la konfesa sincereco, kiu estas ne-laŭta, sed profunde subjektiva. Kiam lia edzino krias dum sia agonio en atombomba malsano siajn lastajn vortojn, la edzo reagis jene — lumigante per tio la fonon de la japanaj problemoj kaj japana vivo:

"Tio pikis mian koron... Dum 13 jara kunvivado — feŭdisma komplikita familia vivo, en kio vivis maljuna patro kuŝanta en lito pro hemiplegio, duonpatrino kapricema, tri duongefratoj kaj ŝiaj

tri gefiloj naskitaj sinsekve — ekonomia vivo de malriĉa instruisto, kiu igis ŝin malplenigi ŝian komodon kaj fariĝi sen-konscie lerta en negoco kun lombardisto — geedza vivo kun mi... reale ŝi estis ja nenio alia ol "labor-abelo", sklavo kaj ĉevalino."

Kvankam tute ne temas pri korgajiga libro, male pri verko, vokanta al la plej serioza solidaro en la signo de la funebro, mi iom bedaŭras, ke ĝi aperis ĝuste sub tiu afiŝeca titolo, sub kiu oni konjektas rutinan propagandon, kvankam por tre justa afero. Sed la libro donas ion tute alian: profundan, homan dokumenton, tre gravan kaj tre legindan.

La artaj ilustraĵoj de Maruki Iri kaj Akamacu Toŝiko efikas fortege, same kiel la tuta libro.

GULLIVER-VOJAĜO EN JAPANA VARIANTO

KAPAO kaj aliaj rakontoj de *Akutagawa*, (trad. *Nozima* 94 p. eld. Japana Esp. Instituto, Hongo-Motomati I. Tokio. Prezo: 0:50 usonaj dolaroj).

Akutagawa estas tre atentinda fenomeno de la mondliteraturo, vere elstara novelisto, kiu batalas en ĉiu sia verko kontraŭ problemoj, ŝajne ne solveblaj. Tia konscienco, kiun tiom premis la socia atmosfero, fine ne povis fari alian konkludon ol la sinmortigon. Li ne estis pli ol 35-jara, kiam en 1927 li mortigis sin.

La plej grava parto de la volumo (bel-aspekta) estas la titolnovelo, kiu cetere

estas ankaŭ la plej longa. Sur ĉ. kvindek paĝoj la novelisto priskribas sian vojaĝon en la lando de la Kapaoj. Kapao estas laŭ la japana folkloro fantazia besto; ilia lando laŭ la fantazio de Akutagawa estas konsiderinde homa. La celo de la verkisto estas pintigi sian skribilon kaj pike atentigi la leganton pri la kuriozaĵoj kaj maljustaĵoj de la socio. Tiu ĉi japana verkisto apartenas al la satiraj geniuloj kaj rememorigas Swift, kiu sendube influis lin. Sed Akutagawa malgraŭ tio estas tute originala talento kun profunda mal-kontento pli ampleksa ol lia granda pesimisma antaŭulo. Tipa ekzemplo estas la stranga detalo pri la akuŝo de la "kapa-oj". Antaŭ la nasko oni enkrias al la naskiĝonto la demandon: "Ĉu vi volas naskiĝi en tiu ĉi mondo?" En la aktuala okazo la ido jene respondas el la utero de la patrino: "Mi ne volas naskiĝi. Antaŭ ĉio... ĉe mia patro jam nur la psika malsano estas eksterordinana. Kaj plie mi estas konvinkita, ke la kapaeca ekzisto estas malbona." En tiaj okazoj, kiam la ido ne emas komenci la grandiozan spektaklon de la vivo, oni malaperigas ĝin sen ia spuro de la ekzisto.

Inter la aliaj noveloj la groteska "Nazo" estas en tiu sfero de la fantazio, kiu estas pli malfacile sekvebla ol la realmiksitaĵoj de la bonega unua novelo. La du ceteraj noveloj la naïve idilia kaj infanpsikologia "ŝarĝvagone-to" kaj la moralisma fabelo pri Tu Cuĉun prezentas alian faceton de tiu ĉi grava talento.

F. S.

MIRAKLO EL NEDERLANDO

Miraklo el akvo

Nederlando (Kolekto de fotoj de *E. van Wijk*, kun teksto de *E. Elias*, trad. de *Julia Isbrucker*. Grandformata: 22×31,5 cm. 191 p. el kiuj 16 p. kun kolor-fotoj. Luksa bindo. Prezo 27:50 ned. guldenoj, sendkosto 1 guldeno. Eld. W. van Hoeve, den Haag, vendata ĉe la Internacia Esp. Instituto, den Haag.)

La nederlandanoj donacis al ni unu el la plej luksaj kaj belaj libroj en nia literaturo. Laŭ la naturo de la verko la klasike belaj fotoj estas la plej gravaj en ĝi. Ili prezentas la landon en laboro, en ripozo, ĝian naturon, ĝian kulturon, en

sunlumo kaj pluvo (belegaj pluvbildoj!), somere kaj vintre, fizikon kaj spiriton, kiun lastan determinas, la konstanta batalo kontraŭ la akvo por la tero.

La enkondukaj vortoj de la diversaj ĉapitroj (en bona traduko) digne kompletigas la bildaron. Van Wijk estas foto-artisto de agordoj kaj tipoj, kaj ĉiu unuopa bildo prezentas ion tute specialan, konsiderindan kaj allogan. Por rememori aŭ interkonatiĝi pri Nederlando, ni apenaŭ povus imagi pli bonan gvidanton ol la bildojn kaj agrable sordinitajn tekstojn de tiu ĉi belega libro.

F. S.

NI CITAS

iom el la supre recenzita libro "*Miraklo el akvo*".

Akvo — dolĉa kaj sala — estas eterna fonto de la prospero de Nederlando. La maro kaj riveroj estas ĝia ekzisto.

Estas malnova kaj milfoje rakontita historio: kiel Nederlando kreis sin mem el la akvo, kiu estas ĝia amiko kaj ĝia pramalamiko.

Estas malnova rakonto, kiu ankoraŭ ne finiĝis; ĉar daŭre naskiĝis nova parto de Nederlando el la akvo kaj daŭre la akvo klopodas repreni, kion oni forrabis de ĝi.

Malnova kaj trouzita vero: ke Nederlando kaj la akvo estas unu.

La paca silento apenaŭ inspira, sed impresa, estas eble plej karakteriza por la vivmaniero de Nederlando. La pruda pureco estas kelkfoje sufoka, sed en tio estas forto, kiun vi ne devas subtaksi.

— — —

La popolo estas modera en ĉio, en kio iu popolo povas esti modera; ni havas kelkajn kermesojn, malgrandan karnevalon en kelkaj lokoj; ni havas kartludan klubeton kaj ni — en certa mezuro kaj singardemo — partoprenas en la teatroj kaj koncertaj eventoj.

MODERNA LERNOLIBRO

Esperanto för alla (Eld. Esperanto-Skolan, Stockholm, form. 25x17,5 cm. 80 p., broŝurita. Prezo: 4:50 kr.)

Tiu ĉi adapto de pli frue aperinta lernolibro kun franclingvaj komentoj, distingas sin jam unuavide per sia agrabla eksteraĵo, simplaj, sed lertaj bildoj, klara divido. Entute oni povas konstati tuj, ke fine oni aperigis lernolibron, kiu estas bonege uzebla por infankursoj, sed ankaŭ en ceteraj aranĝoj.

La kurso enhavas 20 lecionojn — direktmetodajn — kaj ĉiu leciono finiĝas per la felietona aventura ĉapitro de Johanino kaj Karlo, du infanoj, kiuj iom post travojaĝas la tutan mondon, dank' al la helpo de la ĵus akiritaj scioj en Esperanto. Amsterdamo, Stokholmo, Laponio, Berlino, Tirolo, Moskvo, Austriolio, Italio, Egiptio, Parizo estas la haltejoj de tiu ĉi rapida vojaĝo, kiu finiĝas per tutmonda Esp.- kongreso, kie ili ĝojege interparolas per unu lingvo, Esperanto. Kompreneble ankaŭ tiu ĉi felietono, kiel la tuta libro, estas lerte kaj riĉe ilustrita. El pedagogia vidpunkto estas tre grave, ke ilustraĵoj estu laŭcelaj, kaj tiurilate oni povas konstati, ke la bildmaterialo estas bone elektita, facile komprenebla kaj, tie, kie la bildoj laŭ la naturaj limoj de la ilustra ebleco, ne tute klarigas sin, intervenas la instruanto, je kies dispono estas koncizaj kaj klaraj konsiloj en ĉiu leciono. Post ĉiu leciono estas same konciza resumo de la gramatiko en la sveda lingvo.

La libro ĉefe estas kursa lernolibro kaj post ĝiaj 20 lecionoj la lernantoj disponas pri respektinda kvanto da vortoj, gramatika scio kaj ankaŭ pri kono de la prefiksoj kaj sufiksoj, el kiuj tamen mankas la, jam nun oficialigita *-end*. Oni povas imagi la uzon de la libro ankaŭ por memlernado, kiuokaze la "ŝlosilo" povas esti ĝia helpilo.

Por prezenti iun karakterizan parteton el la libro ni citas kelke da frazoj, kiuj gvidas al la kompreno de la sufiko *aj-*:

Ŝi faras floron el papero. Li faras meblon el ligno. La floro estas paperaĵo. La meblo estas lignaĵo. Botelo estas el vitro; ĝi estas vitraĵo. Furno estas el fero; ĝi estas feraĵo. Bombonoj estas el sukero; ili estas sukeraĵoj. La hundo manĝas viandon; viando estas manĝaĵo. La kato trinkas lakton; lakto estas trinkaĵo.

Sume: tre rekomendinda lernolibro!

St. Urban

HELIKO

Heliko malgraŭ
malrapido
antaŭen paŝas
kun solido.

Kaj eble tial
(kaj pro l' kredo!)
ĝi havas domon
en posedo.

POPOLA RAKONTO – LUKSA ALBUMO

Ivan Levstik: Marin Krpan. Tradukis Joze Kozlevčar. Grandformata libro fortike bindita (ĉ. 29x24 cm), kun 30 tutpaĝaj multekoloraj ilustraĵoj kaj 30 paĝoj de teksto. Eldonis: Eldona Sekcio de Slovenia Esperanta-Ligo, Mikloŝiĉeva 7, Ljubljana, Jugoslavio. Prezo ne indikita.

”De tempo al tempo parolis Moliĉar al mi pri iamaj tempoj, pri homoj, pri ilia vivmaniero kaj iliaj interrilatoj. Iun dimanĉan posttagmezon, kiam ni sidis sur la benko en ombro de tilio, li rakontis la sekvan rakonton:

En Interna Karnio troviĝas vilaĝo, nomata Vrh. Ĉi vilaĝe vivis en antikvaj tempoj Krpan. Laŭdire li estis tiel granda, ke ne facile oni trovas similan. Laboro ne plaĉis al li. Lia sola okupo estis

kontrabandi maran salon sur sia ĉevalineto...”

Tiel komenciĝas la rakonto pri la fortuskola Krpan kaj liaj aventuroj, kiuj gvidas lin en la kortegon de la imperiestro, de kie li resopiras al sia hejma vilaĝo. Sed antaŭ tio li venkas giganton kaj implikiĝas en la intrigojn de la kortego, kiun li neniam povas ekŝati. La luksa, albumformata eldono estas ilustrita de fabelecaj multkoloraj bildoj kaj entute la simpla stilo de la rakonto, ĝia terodora agrabla etoso kune kun tiuj ĝi tute ne modernaj bildoj regvidas nin en la tempon de la memoroj kaj entute ili efikas vere agrable. Infanoj kaj eksinfanoj same volonte ĝuas la, ne tre komplikan, sed naturan kaj interesan teksadon de la fantazia rakonto, kiu jam antaŭe aperis en pluraj lingvoj.

Tre konvena premio-libro post komencaj kursoj! Entute rekomendinda.

RID-ANGULO

Vigla historio

Usonano rakontas al svedo pri la lastaj rezultoj de la amerika scienca progreso:

— Jes, estis kiel mi rakontis. Tiu viro perdis ambaŭ okulojn ĉe tiu detonado. Sed poste li venis al specialisto, kiu enmetis du absolute vivsimilajn porcelanajn okulojn. Tiuj okuloj estas provizitaj per miniaturaj aparatoj, tiel, ke la blindiĝinto tuj re-ekvidis kaj vidas ankaŭ nun precize, kiel vi aŭ mi.

La svedo iom silentis. Poste li diris:

— Tio estas vere io mirinda. Sed en mia urbeto okazis, ke junulo akcidentis. La maŝino amputis lian dekstran manon.

Feliĉe eminenta kirurgo restadis tie, kiu venis tuj al la junulo kaj vidante maljunan bovinon en la proksimo, kun granda rapido foroperaciis unu el la mamoj de la bovino kaj alkudris ĝin al la manradiko de la knabo. De tiam la afero estas en la plej granda ordo. La dekstra mano de la knabo donas ĉiutage 5 litrojn da lakto.

— Tio estas mensogo, diras la usonano.

— Tute ne. Mi eĉ scias pri iu, kiu vidis la knabon.

— Kiu li estas?

— Mi kredas, ke vi konas lin. Estas tiu ulo kun la porcelanokuloj...

OBSERVO

LA MODERNA VIRINO EN ANTAŬDIROJ

Apostolo Paŭlo certe ne favoris al la feminismo; en sia letero al la Efesanoj li atentigas siajn adeptojn jene: "Edzinoj, submetiĝu al viaj edzoj same, kiel al la Sinjoro. Ĉar edzo estas kapo de la edzino, kiel ankaŭ Kristo estas kapo de la eklezio."

Ĝis la komenco de nia jarcento pasis multe da tempo post tiu epistolo, sed estas rimarkinde, kiom malmulte la feminismo radikiĝis ĉ. 1900 en la cerboj de multaj viroj. Paris-a gazeto en la jaro 1900 demandis siajn legantojn, kaj inter ili ankaŭ la eliton de la spirita vivo, kiel ili imagas la virinon de la 20-a jarcento. El la respondoj ni menciis kelkajn, reprezentantajn diversajn vidpunktojn.

Leoncavallo, la granda komponisto diris: "Ho, kiel artisto kaj poeto mi eksentas frostotremojn, se mi pensas pri virinaj advokatoj, virinaj kuracistoj kaj virinaj bankistoj. La virino estas amo, idealismo kaj memofero. Ŝi restu tia. Tiamaniere ŝi daŭros regi la mondon.

Francois Coppé, plej ŝatata poeto de tiu tempo en Francujo, skribis: "En la nuna momento en Paris laboras dudek kuracistinoj. Sed ili trovas nur malmultan klientaron. Sed mi ne povas imagi societon, en kiu la virinoj estos kuracistinoj kaj advokatinaj, serĉantaj vivtenon sur la tramo aŭ du-rado. Mi vidas forlasitaj la infanojn, konfiditaj al la prizorgo de servistoj. Kaj pro tio mi deziras, ke la virino de la estonto, almenaŭ iom, simulu al la virino de la hodiaŭa Eŭropo."

Theodor Mommsen, la granda germana historiisto, evitis la respondon: "La virino de la 19-a jarcento kaŭzis al ni jam tiom da cerbumado, ke estus same malĝentile

kiel vane, antaŭdiri eĉ nur per kelkaj linioj, kia estos la virino de la 20-a jarcento."

George Ohnet, konata romanverkisto, profetis nenion. Li diris: "De kiam ekzistas la mondo, nenio ŝanĝiĝis ĉe la virino, krom ŝiaj vestaĵoj. Jam en la tempo de la kreado Eva montris sin tia, kia ŝi estas hodiaŭ. Tiam ŝi havis ja nur unusolan vestaĵon: sian hararon. Hodiaŭ ŝi surportas jupon, puŝmanikojn kaj riĉe falditan kolumon. Ŝajnas, ke ŝi tre ŝanĝiĝis. Sed ŝi restis, kia ŝi estis."

Georg Brandes, la filozofo, skribis: "Mi pli volonte volas paroli pri deziroj, ol pri supozoj. Mi opinias, la justeco postulas, ke la laboro de la virino devas esti pli bone pagata. Ankaŭ en la sentovivo de la virino, ŝanĝo estas necesa. La duono de la virinaj sentoj estas foruzitaj de la ĵaluzo kaj tamen ne ekzistas pli aĉa sento ol ĉi tiu. La fariseaj juĝoj pri needzinigitaj virinoj, kiuj havas nelegajn infanojn, devas ĉesi. Oni devas doni al la virino, ĉu edzinigita ĉu ne, la eblon, eduki sian infanon, sen veni en la danĝeron, esti eligita el la societo.

Marcel Prévost, aŭtoro de multaj sukcesaj romanoj, respondis: "La inteligenteco de la virino de la 20-a jarcento kreskos kaj fortiĝos kaj per tio ankaŭ ŝia sento por sendependeco. Ŝi havos malpli da pasieco, sed ankaŭ malpli da hontemo. Ŝi okupiĝos pri siaj personaj interesoj, estos egoista, sed sobre egoista, kio ne malhelpos daŭran simpatian al iu viro. Ŝi havos malpli da ĉarmo, malpli da sorĉo, sed pli da certeco. Malpli da delikateco, pli da prudento. Tiel mi imagas la virinon de la dudeka jarcento.

Laŭ la lingvosciencistoj la diversaj nombroj de la sonoj en la diversaj lingvoj indikas, ke la sonoj iom post iom aperis dum la lingvohistorio. Certaj konsonantoj troviĝas en ĉiuj lingvoj: k, l, m, n, p, t, v, el kiuj poste formiĝis la ceteraj konsonantoj.

Laŭ interesa artikolo de *A. B. Piri* (Hid, Novi-Sad, 1955. 2.) la homo komence per sonoj — proprasencaj — esprimis sin. Tiuj ĉi proprasencaj sonoj estis konsonantoj. Parto de la konsonantoj laŭ la vico de la kreiĝo antaŭis la vokalojn. La unuaj sonoj de la homo estis la supre menciitaj. La vokalo nur tiam aperis, kiam la homo komencis formi vortojn el tiuj ĉi proprasencaj konsonant-sonoj. Unue aperis la ne artikulita pra-vokalo, kaj el ĝi devenis la ceteraj vokaloj. La pra-hebrea skribo ekz-e ne havas literojn por la vokaloj; nur poste oni estigis sistemon por la aplikado de la vokalaro, konsistantan el punktoj kaj linioj. Dum la konsonantoj formiĝas diversloke (ĉe la lipoj, dentoj ktp.), ĉiuj vokaloj kreiĝas samloke en la gorĝo per la vibrigo de la sonorubando, ni nur modifas ilin per nia buŝo, dum ni eldiras ilin.

Pri parenca temo aperis artikolserio en la Heroldo de *Frieso Moolenar* (Lingvo kaj ritmo, Heroldo 4 kaj. 5. 1955.) La verkinto de tiu ĉi artikolo ne parolas pri

la pralingvo de la homaro, sed la akcentas la plusgravon de la vokaloj kaj rekondukas almenaŭ la lingvon de la unuopa homo al la vokaloj:

”Fakto estas, ke la vokaloj ludas gravan rolon en ĉiuj lingvoj sur nia tero.

Tiun naturfenomenon ni tute ne konsideru kiel strangaĵon, ĉar kiam ie ajn sur la tero naskiĝas infanoj, iliaj unuaj krietoj estas ĉiam speco de vokalo. Tuj kiam ili nutras sin el la patrina mammo, vi aŭdas certan konsonanton. Ne estas mirige, ke la vorto ”mamo” aŭdigas dufoje la literon ”m”, kun ĝiaj tri antenoj. Kaj, kredu nur, se la patrino finas tro frue la nutradon, la idoj krias kaj kriegas per vokaloj!

Memorante la proverbon: ”Infana inklino restas ĝis la fino”, ni do bone povas kompreni la gravecon de vokaloj en ĉiuj homaj lingvoj.”

Kvankam la interesa artikolo de F. Moolenaar prezentas nur vivan praktikon, la vidpunktojn kaj la lingvajn konsiderojn de muzikisto, oni povas supozi, ke la hipotezo de A. Balázs Piri ne trovas aprobon ĉe la alia aŭtoro. Malgraŭ tio oni emas akcepti la hipotezon de A. B. P., eble kun iom da modifoj. Ĉiukaze estis interese apudmeti tiujn ĉi samtempe aperintajn artikolojn, kiuj ambaŭ teoriumas pri la fakta kaj historia graveco de konsonantaj kaj vokaloj.

KORESPONDI DEZIRAS

Lernantaro, konsistanta el 18 personoj volonte korespondus kun svedaj esperantistoj pri diversaj temoj. Adreso: Instruisto Imre Vágó, Rudas László u 21. Pécs, Hungario.

Mi nur nun komencas lerni Esperanton. Tamen jam nun mi volonte korespondus kun esperantisto en la franca kaj angla lingvo por poste transiri al Esp. Scienco, arto, intelekta kulturo, sporto interesas min. Adreso: S-ro Francis Furlan, St. Antoine de Breuilh, Francio.

E N H A V O

Saluto	1
Tra nia prismo	2
Elekto-Aflikto (G. Fröding — M. Carlsson)	6
Svedlando post jarcento (E. Gamby — S. O.)	7
La pantalonoj (K. Sass — F. S.)	10
Inspiro (G. Mattos)	16
Poemo (S. Carlsson — A. Emanuelson)	17
Sveda Helpo	18
Infano desegnas (F. S.)	19
Al miaj gepatroj (G. Munch-Petersen — Thorsen)	28
La Esperanto-statuo en Gotenburgo	29
Energio kaj tero (L. Buruncz)	30
Marista Lulkanto (E. Taube — M. Carlsson)	31
Posttagmezo (E. Lindorm — M. Carlsson)	32
Songogruko (Kumbell — Thorsen)	32
Poeto kaj popolo (P. Thorsen)	34
La najtingalo (H. C. Andersen — L. Zamenhof)	35
Nia Forumo	42
Hispana abstino (Poul Thorsen)	43
Nabab' mi estas (F. Szilágyi)	44
Diversarkivo	45
Afrika akvarelo (M. Firmo)	46
Lustro kaj ĉifono (St. Urban)	46
Ĉinaj paraboloj	47
Alvoko al la junularo (S. Kassai)	48
Robert Bruns (J. Aakjer — P. Thorsen)	49
La pli forta (A. Strindberg — V. Ekström)	50
Librokulturo. Recenzoj pri la jenaj libroj: Magda Carlsson: Sveda Poemaro, P. Thorsen` Rozoj kaj Urtikoj, I. Lapenna: La Internacia Lingvo, S. Alejĥhem (M. Salzmann): Al ĉiuj egale, M. Hiroŝi kaj G. Cutomu: La ĉasteco de Japanio, Ogura Toyofumi: Kun la kadavro de l' edzino, Akutagawaka (Nozima): Kapao, E. van Wijk — E. Elias (J. Isbrucker): Miraklo el akvo, Esperanto för alla, I. Levstik (J. Kozlevĉar)	
Marin Krpan	54
Ni citas	59
Heliko (St. Urban)	60
Rid-angulo	61
Observo: La moderna virino en antaŭdiroj	62
Pri la prasonoj	63

ENIGMO

La literoj de la sekvaj vortoj donas en ĝusta ordo titolojn de konataj literaturaj verkoj en Esperanto:

1. Trianon, fonoj, tene
2. Torda, eĉ striko
3. Jam, do, tendo, save, en, nea
4. Rano, devo, velas
5. Roko, tire
6. Bala, urtikstango

7. Garni, celo, Lanti, vian
8. Manka, tronaj, ondoj
9. Peras, doma, vco
10. Por akvo

Bonvolu sendi la solvojn antaŭ la 15-a de majo, 1955. Ni premios la unue malfermitan ĝustan solvon. Skribu sur la koverton: *Titol-enigmo*.

28a SAT-Kongreso

6/8-18/8 LINZ Aŭstrio 1955

Kongreskotizo

ĝis 30/4 -55 poste:

SAT-anoj	10:—	13:—
Geedzoj	17:—	21:—
Gejunuloj ĝ. 20 j	6:—	7:50
Gastoj	13:—	16:—
Subtenanta	5:—	
Infanoj ĝis 15 jaroj aliĝos senpage.		

Loĝejo

Amasloĝejo:

a: (kun litotuko k kovrilo, fluan-ta akvo)	2:20
b: (sen litotukoj) (en lernejo) ..	1:10

Hotelo:

a: unulita ĉambro	5:50
a: dulita ĉambro (po ĉambro) ..	8:80
b: unulita ĉambro	4:40
b: dulita ĉambro	6:60

Tendejo estos 20 min. piede al la kongresejo, 10 min. per tramo. La prezo estos tre malmultekosta, laŭ OKK.

Manĝo

En komuna manĝejo por 200 personoj:	
tagmanĝo	2:20
vespermanĝo	2:20
En aliaj gastejoj k restoracioj:	
tagmanĝo	3:30
vespermanĝo	2:65

Ekskursoj

Por la duontaga ekskurso sur Danubo ne estas ankoraŭ fiksita prezo. La tut-taga ekskurso al Salzkammergut, (pli ol 3000 m. montpintoj), kostos proks. 13:—.

Vojaĝkosto:

Individua bileto de Malmö = 198:—, grupo 10 p. 182:—, grupo 25 p. 152:—.
Individua bileto de Stockholm = 262:—, grupo 10 p. 243:—, grupo 25 p. 206:—.
La prezo inkluzivas la lokbileton de Grossenbrode—Linz.

Ĉar mi ankoraŭ ne estas certa pri mia partopreno, mi serĉas iun kiu volus gvidi la karavanon. *Mi petas vin tuj sciigu vian intencon*, ĉu vi volas veturi grupe. Ĉar se sufiĉe multaj sin anoncos, mi klopodos iel solvi la aferon.

Vizon oni ne bezonas al Aŭstrio, se vi havas svedan pasporton.

Ne forgesu sendi vian aliĝilon k vian kongreskotizon al mia konto 38 15.

Se vi ne veturos, vi tamen povas aliĝi kiel subtenanta k ricevi la kongresdokumentojn k kongresinsignon. Aliĝiloj estas haveblaj ĉe mi.

Dezirante al vi tre agrablan ferion k preparon mi kamaradece salutas

Justo.

UTGIVAREKORSBAND

Norda Prismo

Barnhusgatan 8. Stockholm

APERIS NOVA MODERNA LERNOLIBRO ESPERANTO FÖR ALLA

20 lecionoj laŭ la rekta metodo. Multe da ilustraĵoj, konsiloj al la kursgvidanto; gramatikaj resumoj en la sveda lingvo. Bonega libro i. a. por infan-instruado.

PREZO: 4:50 kr.

Mendebla ĉe ESPERANTO-SKOLAN,
Barnhusgatan 8, Stockholm C.

"KVINA RAPSODIO"

Kolekto de bonhumoraj, facilstilaj noveloj, poemoj k. c. Taŭga legolibro por daŭriga kurso aŭ por memlernantoj.

Prezo: 4:— kr.

Mendebla ĉe la redaktino-kompilinto:
F. SZILÁGYI, Mariedalsgatan 9, Borås

SVEDA POEMARO

Tradukoj de *Magda Carlsson* gajninto de la 2-a premio en la Belartaj Konkursoj 1954.

"Ŝi amas kaj majstras nian lingvon. Ŝi similas al ĝardenisto milda kaj komprenema, kiu amas siajn florojn kaj vidas en ili individuojn."

El la enkonduko de d-ro F. Szilágyi.

32 svedaj poetoj. 112 paĝoj. Bindita sv. kr. 6:—.

Mendu ĉe: ELDONA SOCIETO ESPERANTO
Fack 19071, Stockholm 19